6-a Jaro. N-o 269 APERAS SEMAJNE 28. Novembro 1929



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e — Gvidanto: E. Lanti | SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e | ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27 — Administranto: R. Lerhner

Ĉu la Ligo de Nacioj konsistigas ion novan?


Dum ĉiuj registaroj konkuradas en militpreparoj, la popoloj vivas senzorge, lulite de la espero al daŭra paco, per la klopodoj de la Ligo de Nacioj. La tuteŭropa gazetaro (krom eble la faŝista k la komunista) provas teni sian legantaron en tiu iluzio.

Mi volonte konsentos, ke en Ĝenevo oni ne preparas konscie la militon. Por mia tezo tute ne domaĝas, ke la Briandoj, Benesoj, M'kdonaldoj k. a. famaj "pacifistoj" deziras sincere malebligi la militon. Ne sufiĉas bonaj intencoj por atingi la celon. Ĉiuj plej famaj manifestacioj de la Ligo de Nacioj favore al la paco ne forigas la fakton, ke ĉiu nacio ĵaluze volas konservi sian sendependecon, sian suverenecon. Tio estas la kerno de l' problemo k kondiĉas la neeviteblan fiaskon de ĉiuj plej "sinceraj" aranĝoj porpacaj. Tial ke la nacia aŭ ŝtata suvereneco restas netuŝenda principo en la internaciaj rilatoj, tio signifas, ke en Ĝenevo temas nur pri tenado de ekvilibro inter diversaj antagonistaj fortoj. Tia ekvilibro sekve estas nur provizora. Ĝi povas daŭri dum 20, 30, 40 aŭ pli aŭ malpli da jaroj, tamen ĝi neniel estas io definitiva. La fama filozofo Kant konsentas pri tio, ke la natura stato inter ŝtatoj estas la milita stato.

Sed la senĉesaj k bombastaj paroladoj k deklaroj porpacaj de famaj ŝtatistoj sukcesas tre bone krei iluzion en la popolamasoj.

Ĉi-lastaj, cetere, ne bone konas la historion; ili facile kredas, ke la Ligo de Nacioj estas io nova, ke finfine stariĝis institucio, kiu trudos pacon al la mondo. Estas do interese k utile montri, ke similaj organizoj jam ekzistis en la pasinto k ke ili ne sukcesis certigi la pacon.

En la antikvo, kelkajn jarcentojn antaŭ Kristo, ekzistis en Grekio institucioj, kiuj tre similis la nunan Ligon de Nacioj. Funkciis arbitracio inter la civitoj. Tion montris klare burĝa verkisto, Viktor Berar (Bérard), en sia tezo: De arbitrio inter liberas Graecorum civitates (Pri ar-



bitracio inter liberaj civitoj Grekaj). La amfiksjonioj (Ligoj de civitoj aŭ ŝtatoj kun politika k religia karaktero) k similaj institucioj havis tute la saman celon kiel la Ĝeneva. Tiuj ligoj sukcesis kelkokaze eviti militojn; sed, tial ke ĉiu civito (ŝtateto) konservis sian sendependecon k suverenecon, la paco restis ĉiam nur provizora.

Estiĝis diversaj provoj por unuigi la civitojn de Grekio. Ili ĉiuj restis sensukcesaj. Neniu civito konsentis rezigni sian suverenecon k kunfandiĝi en pli grandan unuiĝon. Kaj jen kio okazis: La Romanoj faris tiun unuiĝon perforte, konkirante ĉiujn malgrandajn ŝtatojn . . .

Estas tre interese noti la similon, ekzistantan inter la nuna situacio en Eŭropo, rilate al Usono unuaflanke, k tiu de Grekio, rilate al Romanio duaflanke. La tiutempa tekniko en Grekio disvastiĝis eksteren k la Romanoj plej bone scipovas ĝin alpreni k aplikadi. La samo okazis rilate Usonon. Tie enplantiĝis k nun plej sukcese aplikiĝas la tekniko naskita en Eŭropo. Usono nuntempe, kiel Romanio en la antikvo, konsistigas la plej grandan potencon. Oni tute ne fantazias, prezentante al si jenan bildon: Iun belan tagon, kiam Eŭropo, pro internaj (internaciaj) militoj, estos ankoraŭ pli ol nun malfortiĝinta, tiam Usono, imite al la Roma Imperio, trudos sian superregadon al ĉi tiu kontinento. La hipotezo ne estas malsaĝa, sed male tute racia.

Oni ne rebatu, ke la antikvaj civitoj ne estas komparindaj kun la nunaj nacioj. La ĉefa diferenco ekzistas nur rilate la amplekson. Esence la problemo estas la sama. La nuntempaj eŭropaj nacioj ne volas rezigni sian suverenecon, kvankam la Ekonomio postulas tion. La psikologio de la popoloj malebligas tian rezignon. Ne vane la Lernejo, la Eklezio, la Gazetaro disvastigis naciismon, patriotismon. La nacianoj nuntempe estas en la sama spiritostato kiel antikvatempe estis la civitanoj. Cetere la diferencon pri amplekso larĝe kompensas niaj modernaj interkomunikiloj. La Grekoj k Romanoj ne konis vaporŝipojn, nek fervojojn, nek aviadilojn, senfadenan telegrafion k. s.

Estas ankaŭ notinde, ke Usono ne konsentis aliĝi al la Ligo de Nacioj. Ĝi ja plene konscias, ke en Ĝenevo oni celas ĉefe prizorgi eŭropajn interesojn k kontraŭstari al la usonaj. Neniuj plej elokventaj frazoj povas forigi tiun fakton.

La nuna Ligo de Nacioj ne konsistigas ion esence novan en la Historio. La militkaŭzoj restas la samaj kiel en la pasinta tempo. Oni simple trompas

Resumoj el la libro "Standards" (Normoj)

(2-a daŭrigo. Vidu n-ojn 267/68)

En Fabriko

Pli grandan produktadon atingas la usona grand-industrio kun malpli da streĉado ĉe laboro, skribas Dübreŭj, dank' al Raciigo. (Raciigo: t. n. Telorismo: post provoj sistemoj (reguloj), normoj):

Usona laboristo tute ne kutimas trostreĉi siajn fortojn. Ekzemple li ne portas pezan metalpecon, sed trenas ĝin post si sur laboreja vagoneto aŭ eĉ, sen speciala vagoneto, trenas ĝin per fadeno en iu skatolo sen radoj. Dübreŭj timis, ke li ne estos sufiĉe lerta, muskol-riĉa, inter la timigaj usonaj laboristoj. Sed, male, li lernis de ili malŝaton je trolaciĝo.

Li distingas du malsamajn Telorismojn: Telorismon de 1880, kaj Telorismon de 1929. — Telorismo de 1880 terura, peniga, hom-mortiga. — Telorismo de 1929, kiu tendencas faciligi la laboron kaj ne plu malsanigas laboriston, kiam ĝi estas bone aplikata.

Li montras kiel ekzemplon de moderna Telorismo la fabrikegojn Ŭajt & Ko (White & Co.) en Klivl'nd (Cleveland-Ohio).

Por 2500 laboristoj, 30 tempostudistoj kronometras ĉiujn laborojn, eĉ laboron de ŝarĝistoj-ekspedistoj, eĉ laboron de skribmaŝinistoj. (Neníu virino laboras en tiu fabrikego.)

Ĉiuj laborantoj kutimiĝis je tiu tempokontrolo, kaj neniu malŝatas, kiam tempomezuristo ekhaltas apud li preterpasante kaj enskribas tempojn. Tiel "meza tempo", kaj ne plu "la plej bona tempo" estas kalkulata.

Laŭ la spertoj de tiuj tempostudistoj kaj inĝenieroj, la labormetodoj ofte ŝanĝiĝas en la fabriko. Tial Dübreŭj nomas la modernan Telorismon "reĝimo de seninterrompa metod-revolucio". Eĉ skribmaŝinistoj ricevas premiojn pro rapido. Ne fariĝas unu laboro, sen notado pri ĝiaj tempoj, "rekordoj", kiuj konsultiĝos por organizi samspecan laboron. La celo estas atingi, sen pli da lacigo por la laboristo, pli ĝustajn korpomovojn malpli lacigajn, pli da laborrezulto kun malpli da laco. Kiom eble plej ofte, Telorismo anstataŭigas homan korpomovon per maŝino.

Multaj usonaj fabrikmastroj tre zorgas ankaŭ pri la kvalito.

Maŝinfabriko kontroliĝas la reziston de ĉiu plej eta laboranta maŝinero, ekzemple de boltoj, ĵus antaŭ muntado. Se la ŝtalo de la bolto ne pruvas sufiĉan kontrolreziston, ĝi ne utiliĝas kaj refandiĝos.

Usonaj industri-estroj ĉiam ĝentile helpis la enketon de Dübreŭj. Studentoj vizitas fabrikojn, laboras kelkajn tagojn apud laboristoj. Nenie tiu malfidemo, sekretemo, kiu regas en multaj eŭropaj firmoj, kiuj malpermesas eniron al siaj laborejoj, kvazaŭ ĉie kuŝus sekretoj. Eĉ konkurantoj kunvenas amike, por aŭskulti metiajn priparoladojn. Ankoraŭ konstatiĝas en Usono la helpemo, la bonhumoro pionira. "Por ĉiu sia ŝanco", jen devizo de la almigrintoj, kiun ripetas la nunaj usonanoj.

La rekta metodo: la provo antaŭ la teorio, la prova konstruo anstataŭ teoria desegnado kaj kalkulado, karakterizas la usonajn labormetodojn. Ekzemple, la inventisto Ĝon Fric (John Fritz) kutimis diri, post konstruo de maŝino: "Do nun, viroj, jen ĝi estas konstruita. Ni ekfunkciigu ĝin por vidi, kial ĝi ne funkcias".

Ĉeflaboristoj diris ĉiam, vidante Dübreŭj preciz-mezuri: "Vi provu, vi ekprovu!" Usonanoj ne inventis ĉion, kiel ili multnombre kredas, — kaj tiu nomo Ĝon Fric por usona inventisto, Ĝon (angle: John) kaj Fric (germane: Fritz), ŝajnas simbolo. Sed ili precipe inventis sennombrajn detalajn pliboniĝojn, ili plibonigis ĉiun ilon, ĉiun laborveston. Tradicio ne paralizas ilin, kaj se ili bedaŭrinde ne estus havintaj tiun Biblion en poŝo de la unuaj almigrintoj, religion ili ne suferus. Kiu malbona hazardo! Dübreŭj tre ŝatas iliajn inventetojn, kiel tiun poŝon por iloj aŭ maŝineroj, kiu ne estas la antaŭtuko mem, el kies poŝo falas eroj, kiam laboristo tro kliniĝas, sed pendanta poŝo, kiu eĉ kiam komplete renversiĝas la homo, pendas teren kaj ne perdas ilojn.

Tiu inventetismo respondas al ilia edukado. Usonaj studentoj tre malserioze laboras en lernejoj. El diversaj lernejoj kaj super-lernejoj ili foriras kvazaŭ nenion sciante. Ili eklaboras apud laboristoj kaj naive lernas metiojn laŭ empiriaj metodoj. Tial ankoraŭ longtempe Usono produktos grandskale "dikproduktojn", facile alĝustigeblajn laŭ okula sperto, laŭ "leĝo de l' dikfingro", dum pli sciencaj produktadoj pli bone sukcesos en "maljuna Eŭropo", ĝenerale.

Tiun "rektan metodon" usonan: provi, plenumi, kronis Lindberg fluginte trans la Atlantikon de Novjorko ĝis Parizo: Kiam li ekflugis, li konis bonege sian flugmaŝinon, sian motoron, ĝis detaletoj. Li estis fluginta (provinta) oftege trans grandegajn distancojn, tage kaj nokte, kaj la usonanoj jam konis lin kiel mirigan long-flugiston. Kvazaŭ ĉiujn eblajn, proveblajn hazardojn li konis ekflugante Parizon. Tre malmultaj neproveblaj hazardoj restis eblaj kontraŭ li. Li sukcesis.

Telor komencante rimarkis, ke ĥirurgoj jam delonge praktikas metodojn, kiujn li mem poste akceptis en industrio: longa faka instruo de ĥirurgi-lernantoj, provoj post provoj, observado de rezultoj, ĉiama perfektigo de la ĥirurgi-iloj. Do, tiuj sciencistoj, kiuj bezonas samtempe grandan scion kaj bonegan manlerton, montris la vojon al industrioj malpli delikataj, por invento de iloj, labormetodoj, instrumetodoj.

Telor de 1880 ne permesis al laboristo pensi. Vi ne pensu; "aliaj uloj ricevas salajron por pensi, en mia fabriko", li eĉ unufoje diskute diris.

Grandega eraro de la unua Telor-Sistemo. Ĉirkaŭ la jaro 1912 en Parizo, enkonduko de tiu hommortiga sistemo tiom indignigis la Parizan laboristaron, ke manifestacioj kaj vigla kontraŭbatalo tuj sekvis. Ĉiuj ripetis, ĉiuj konis tiun kruelan respondon de fabrikmastro al vizitanto demandinta: "...kaj kion vi faras por maljunaj laboristoj?" — "Maljunaj laboristoj estas en tombejo", respondis la teloristo.

"Telorismo de 1929" jam pli respektas laboristan spiriton kaj sanon, eĉ akceptas laborist-delegitojn en fabrikdirektadaj konferencoj, skribas Dübreŭj.

Mastroj usonaj, ĝis antaŭ nelonge, mem prizorgis "patronadajn aferojn" por laboristoj: sport-asociojn, legejojn, amuzejojn. Dübreŭj skribas, ke nun la mastroj, pli demokratie, fordonas al la laborista iniciato organizadon de tiuj asocioj, kaj nur bonkore "pruntedonas" ejojn kaj rimedojn. Jief.

(Daŭrigota.)

---

la popolon per senĉesaj paroladoj pri la paco.

Kaj stariĝas antaŭ ni la demando: Kiel la proletaro el Eŭropo k Ameriko rilatu al la venonta milito inter la du kontinentoj?

Por respondi konvene al tiu demando, necesus konsiderinde plilongigi ĉi tiun artikolon. Tion mi ne faru. Ial estas eĉ preferinde, ke aliuj respondu. Povus ja okazi, ke mi herezumus...

Sufiĉu do altiri la atenton de la legantoj al tiu grava problemo, lasante al ĉiu la zorgon trovi mem la ĝustan solvon. Mi aldiru tamen mian esperon, ke la SAT-anoj, kiuj lasis logi sin en la "Paneŭropan" (Tuteŭropan) movadon, ekkonscios pri sia erarpaŝo k retrovos la ĝustan vojon — la klasan unuiĝon de ĉiuj proletoj de l' Mondo. Ili ekkomprenos, ke la unuiĝo de la Eŭropaj ŝtatoj — se ĝi estus ebla — eĉ ne preparus la pacon, sed la militon kontraŭ Usono. E. Lanti.

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA NOVA EPOKO"

E. LANTI

FOR LA NEŬTRALISMON!

3-a eldono

Tiu ĉi broŝuro, kiu vidis jam la trian eldonon, difinis la pozicion de l' lab. esperantistoj post la mondmilito, montris al ili la ireblan vojon, instigis ilin organiziĝi en propra organizo. La saĝaj konsiloj k antaŭvidoj konservas ankoraŭ hodiaŭ sian valoron kiel antaŭ dek jaroj.

Prezo: 0.30 mk. g.

Havebla ĉe la Administracio:
R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27

LA FRANCA KAMPARO

Libertempaj impresoj

Dum aŭgusto, depost tri jaroj, la malgranda presejo, kie mi laboras, fermiĝas kvar semajnojn. Antaŭ la fermo, la laboristoj ricevas duonan salajron, t. e. la salajropagon de du semajnoj. Ĉar dum la tuta jaro ni ne restas eĉ unu tagon senlaboraj, tiu aranĝo ebligas al ni ripozi agrable sen granda domaĝo por la familia buĝeto.

Mi tre deziris profiti mian libertempon por viziti la SAT-kongreson; sed se mi irus al Leipzig, mia edzino ne povus ĝui restadon sur la kamparo. Tial mi akceptis la proponon de iuj geamikoj pasigi kune kun ili kelkan tempon en malgranda vilaĝo de Franŝ-Komte (Franche-Comté), kie ili posedas farmobienon aĉetitan antaŭ kelkaj jaroj per ŝparita mono. Mia amiko, kiu laboras en gravuraĵ-presejo, ne ĝuas pagatan libertempon, sed ĉar lia edzino ankaŭ laboras kaj ili estas seninfanaj, ili iras ripozi ĉiujare du-tri semajnojn sur la kamparo.

Informiĝinte ĉe la stacidomo kelkajn semajnojn antaŭe, ni eksciis, ke ĝuste komence de aŭgusto ekzistos tielnomata "libertempa" vagonaro por la regiono, kien ni estis irontaj. Uzante ĝin ni povis ricevi ir-reiran bileton validan tri monatojn. Ni tiel gajnis ĉ. 50 fr. frankojn (=2 dol.) po persono. Ni veturis per tiu vagonaro ĝis Bezanson (Besançon), kaj tie ni luis aŭtomobilon por transporti nin kaj niajn pakaĵojn al nia restadejo kuŝanta je 17 km. de tiu urbo.

Ni ĉiuj gastiĝis ĉe maljuna rentulino, vidvino de eksprofesoro, kiu posedas komfortan domon kvarĉambran. Ŝi petis de ni tute malaltan prezon por la pensiono. Ni pagis 14 frankojn (= ĉ. 0,60 dol.) tage po persono[1]. La manĝaĵo estis ĉiam bongusta, ĉar nia mastrino bone konis la kuirarton kaj ofte faris por ni iun frandaĵon. Tial agrable ni pasigis tie pli ol du semajnojn.

Izolita vilaĝeto

Ni troviĝis en regiono de eta terkulturo, pri kiu mi pensas interese iom paroli. La vilaĝo kuŝas en kvazaŭa valo kelk-kilometrojn larĝa, limigita de montetoj kovritaj per belaj arbaroj. Ĝi havas nur 80 loĝantojn kaj konsistas el 25—30 domoj starantaj ĉiuflanke de serpentuma vojo, kaj grupigitaj po kelkaj. Kvankam la vilaĝanoj estas tre dikredantaj, ne troviĝas preĝejo; ili iras al plej proksima vilaĝo por ĉeesti la diservojn. La domoj, precipe la malnovaj, estas tre dikmuraj kun malgrandaj fenestroj, pro la vintra akra klimato, kaj ampleksaj tegmentoj. Ili konsistas almenaŭ el du vastaj ĉambroj kaj la porkulturaj konstruoj (stalo, garbejo ktp.). Multaj domoj havas sur la tuta fasado antaŭtegmenton, kiu utilas por ŝirme loki diversajn kulturilojn; ĝi tre malutilas al la heleco de la ĉambroj.

Ne ekzistas en la vilaĝo unu komercisto kaj eĉ — maloftaĵo — ne unu trinkejo. Aŭtomobile venas ĉiutage panisto kaj du-trifoje semajne aliaj komercistoj.

La regiono estas fontoriĉa; tial en ĉiuj vilaĝoj troviĝas kelkaj fontanoj por provizi la loĝantojn per trinkebla akvo; tien oni kondukas por trinkigi la bestojn. Kelkaj fontanoj posedas tuklavejon. Elektro ekzistas en la regiono, sed ĝi ne estas en nia restadejo, ĉar la vilaĝestraro ne interkonsentis kun la kompanio.

Bonstataj etposedantoj

Ĝenerale la tieaj kamparanoj vivas sufiĉe bonstate, se ne komforte. Tion mi povis konstati, ĉar miaj geamikoj estas iom konataj, kaj ni havis okazon eniri kelkajn hejmojn. Eĉ, pro alveno de la fratino de mia amiko, kiu antaŭe mendis la ĉambron, kiun mi kaj mia edzino okupis, ni transloĝiĝis en ĉambron de terkulturistino, kies edzo mortis en la milito. Tiu ĉambro estis komforta, pura kaj bone meblita.

Cetere en tiu vilaĝo, ĉiuj loĝantoj, krom la luanto de la bieno de mia amiko, posedas sian propran domon kun pli malpli da grundo. Ili ekspluatas mem sian bienon kun helpo de la edzino kaj infanoj. Ne estas multe da kulturlaboro; la plej granda parto de la grundo konsistas el herbejoj. Kelkaj estas ĉirkaŭitaj per pikildrato, kaj tie sin paŝtas tage kaj nokte bovinoj. Pro la foresto de vastaj kampoj la motorkulturo ne estas ebla; sed multaj kulturistoj posedas falĉ-, rastmaŝinon kaj aliajn modernajn ilojn.

Interhelpo kaj komuna arbarposedo

La vilaĝanoj volonte sin interhelpas. Se iu bezonas du ĉevalojn por fari iun laboron kaj posedas nur unu, li sin turnas al najbaro kaj kompense faros al li la saman servon. Tiu, kiu ne povas mem fari sian laboron, farigas ĝin de aliu kaj pagas lin per terproduktoj, ĉar ne estas troveblaj terkulturaj laboristoj. Ekzemple, nia gastigantino posedas herbejojn, kiujn ŝi ne povas falĉi. Ŝi farigas la falĉadon, kaj pagas la falĉinton per duono de la rikolto.

Interese estas diri, kiel la vilaĝanoj profitas de la komunumaj arbaroj. Ĉiujare okazas dehakado de difinita arbarsurfaco. La arboj estas vendataj por industrio kaj la brulligno dispartigata inter la loĝantoj. Ili pagas ĉiu monsumon por la dehakado, sed post la vendo de l' arboj, la vilaĝestraro distribuas al ili parton de la vendoprodukto, kiu kompensas kun profito la faritan dehakan pagon. Tiu agmaniero verŝajne ekzistas en ĉiuj tieaj vilaĝoj kiuj posedas komunumajn arbarojn, ĉar veturinte al alia vilaĝo je 15 km. de nia restadejo, ĉe konatuloj de miaj amikoj, mi eksciis, ke ankaŭ tie oni agas same.

Je 8—10 km. transirinte montetan ĉenon, oni troviĝas en la valo de l' rivero Du (Doubs). Tie la regiono fariĝas industria, precipe kiam oni alproksimiĝas la urbon Bezancon. Bedaŭrinde pri la vivkondiĉoj de l' tieaj vilaĝanoj mi ne povas paroli, ĉar nur unu fojon mi promenis ĝis unu el tiuj vilaĝoj tuŝataj de la industrio.

H. Kaŝon.

[1] Mia salajro (kompostista) estas 375 fr. semajne (ĝi superas la sindikatan tarifon, kiu estas 324 fr.). En vilaĝo tre proksima de tiu, kie ni loĝis, oni gastigis kelkajn parizanojn por 25 fr. tage. En kooperativaj libertempaj restadejoj la meza prezo de pensiono nunjare estis por dupersona ĉambro ĉ. 150 fr. po persono (semajne).



Tradicia festo en Anglio

La 5-an de novembro ĉiujare okazas kurioza festo en Anglio. Antaŭ tricent jaroj, pro diversaj politikaj kialoj, stariĝis bando kun la celo detrui la parlamentan domon kune kun la angla reĝo. En tiu tempo la registaro, por pligrandigi la regnajn enspezojn, luigis la kelojn sub la parlamenta domo al komercistoj. kiuj uzis ilin kiel tenejojn. La citita konspirantaro, profitante tiun ĉi enspezigan metodon, luis la kelojn kaj plenigis ilin per brulligno kaj pulvo. Ilia intenco estis eksplodigi kaj detrui la konstruon kune kun ĉiuj enestantoj ĉe la okazo de l' reĝa malfermo de la sezona kunsido. La komploto, kiu depost tiam nomiĝis la "Pulva Komploto" — preskaŭ sukcesis.

Unu el la anoj de l' bando havis amikon, kiu estis parlamentano. Kaj sekrete li sendis al tiu noton avertanta lin, ke li ne ĉeestu la malfermon. Tiu ĉi amiko informis la policon, kaj ĉi lasta post ekserĉo kaptis la bandestron Gaj Foks (angle: Guy Fawkes) ĵus ĉe la ago de ekbruligo. Tiu ĉi estro devis travivi multe da turmentoj, antaŭ ol li mortis; sed li ne perfidis siajn kunulojn.

Depost tiam la geknabaro anglia festas tiun tagon — la 5-an de novembro. Dum kelkaj semajnoj antaŭ tiu dato la knaboj pasigas siajn liberajn horojn kolektante ĉion bruligeblan: arbobranĉojn, eluzitajn meblaĵojn ktp. Dum ili portas tiujn objektojn hejmen, ofte okazas bataletoj inter la "rabistaj bandoj". Sed, spite ĉio, la 5-a alvenas.

Komence de la vesperiĝo en ĉiu strato troviĝas granda lignoŝtiparo, kaj je la dudeka horo la ligno estas ekbruligata. Sur la supron de la ŝtiparo oni sidigas la "Gaj" (Guy), t. e. homformon faritan el malnovaj vestoj kaj pajlo. Se dum tiu jaro okazas io speciala memorinda, oni ŝanĝas la nomon de la "Gaj", kaj ĝi nomiĝas laŭ la okazo "Kajzer"[1], "Lenin", "Kuk" (Cook) k. a.

Dum la vespero, la knaboj pasigas la tempon eksplodigante diversajn specojn de eksplod-ludiloj, kaj oni defendas sin kaj atakas siaflanke kontraŭ "rabistaj bandoj". Sed je la 23-a horo okazas granda malfeliĉo. La gepatroj elvenas la hejmojn, kaj la geknaboj estas forpelataj al la lito.

Por la geinfanoj ĉi tiu vespero estas la plej atendata de la jaro, sed estas preskaŭ certe, ke neniu el ili scias la devenon de la tradicia afero. Post la 23-a horo la gepatroj grupiĝas ĉirkaŭ la fajro-restaĵoj, babilante kaj la viroj fumantaj. En la cindron oni metas terpomojn kaj kaŝtanojn.

L. B., Leeds.


[1] Germ.: imperiestro.

SENPREĜEJA URBO

En nordo de Sovetio, ĉe la bordoj de l' Norda Glacia Oceano, kuŝas urbo nomata Murmansk. Ĝi distingiĝas inter ĉiuj sovetiaj urboj per tio, ke ĝi neniam havis nek havas... preĝejojn. Ĝi reprezentas la centron de l' Murmanska distrikto, kiu ampleksas 137 000 kv. kilometrojn. Ĝi ludas grandan rolon kiel industria urbo en la plej alta nordo de Sovetio. Ĝia signifo kiel ne glaciiĝanta haveno ĉe la Norda oceano estas grandega. Trans Murmansk oni eksportas multon da trezoroj de l' tuta norda regiono, kiel ekzemple lignon, fiŝon ktp. Ĉeesto de proksima fervojo ankoraŭ plialtigas la signifon de Murmansk kiel industria centro. Kaj tie, en malproksimo, malantaŭ la arkta linio, tiu urbo malrapide disvolviĝas...

La jaro 1929 donacis kiel premion 90 domojn de kolonistoj disŝutitajn sur la vasta teritorio de l' urbo. Norda ŝtata fiŝ-trusto (ruse: Sevgosrybtrest) ankaŭ konstruigis 11 grandegajn domojn, kun ĉiuj instaloj, finante per akvujoj kaj elektro. Venontan jaron oni projektas ankoraŭ konstrui 120 domegojn por la bezonoj de l' loĝantaro. Iom post iom vera moderna urbo konstruiĝas...

Jam ekzistas bonega malsanulejo kun personaro de 30 kuracistoj, kelke da magazenoj, kooperativoj ktp., el kiuj la plej granda kaj impona estas la kooperativo de TPO (Transporta Kooperativa Asocio), fondita en 1925. Anstataŭ malhelaj, kurbaj stratetoj aperas larĝaj, puraj stratoj, eĉ kun nomoj "1-a de majo", "Je la nomo de Komintern" k. a.



Monumento al militmortintoj el jaroj 1918/20 en Murmansk.

Naskiĝis ankaŭ kulture spirita vivo en la urbo. Trifoje ĉiusemajne oni eldonas propran gazeton "Polarnaja Pravda" (Arkta Vero). Interese estas noti, ke la tuta redakcio kaj kontor-personaro konsistas nur el 7 personoj. Kelkfoje dum la semajno la urbon vizitas cirkulanta teatro kaj prezentas spektaklojn, kinoprezentojn ktp., al kiuj kolektiĝas la tuta urba loĝantaro kune kun eksterlandaj ŝipanoj el proksime ankrantaj ŝipoj ĉe l' bordo. Paralele kun tio ĉiuvespere en la malmultaj ekzistantaj manĝejoj kaj trinkejoj multaj laboruloj, oficistoj, servistoj (? Red.) ktp. de la urbo pasigas siajn liberajn horojn por babilado, amuziĝo, trinkado k. s. Oni iafoje krias, diboĉas, ludante per kartoj, domino k. c.; kaj tiaj ejoj similas al "baroj"[1] lokitaj en Klondike (laŭ rakontoj de Ĵak London). En kultura rilato impone impresas la elektra lumo instalita tra la urbo, sed ni aldonu kompletigan rimarkon: ke la lumo tute ne estas bezonata dum tempo de 1. majo ĝis 15. septembro. La nokton, en tiu sezono oni povas rimarki nur laŭ la seruroj pendigitaj sur pordoj de fermitaj magazenoj. La suno seninterrompe brilas disĵetante siajn varmegajn flavorajn radiojn.

Post tiu feliĉa tempo venas la vintro kun siaj longdaŭraj frostoj. Ankaŭ estiĝas kun ĝi plena mallumo dum du monatoj. La vintro donas impulson al sporto. Pasintan jaron estis aranĝataj cervaj kuroj. La indiĝenoj de l' nordo "lopari", bonvestite, en siaj naciaj kostumoj, simile al ventego uragana, trakuris la startojn de l' urbo. La premion por plej bona kuro ricevis iu juna "lopari"-a fraŭlino kun siaj triopaj cervoj. Ŝi ricevis kiel premion samovaron (= rusan fornon), spegulon kaj pecon da sapo.

Tiel la vivo de tiu norda urbo forpasas, kiu — ho feliĉo! — nenion scias pri la sonoj de preĝejaj sonoriloj, posttagmezaj mesoj kaj ĝenerale pri kultaj sensencaĵoj.

Vold, St. Fedorovski (13 059).

[1] Usonaj trinkejoj.



EL USONA TAGLIBRO

21. oktobro. Okazas la 50-a datreveno de l' elektra lumo. Ford kaj Huver (Hoover) kaj aliaj eminentuloj publike renkontas kaj gratulas la mondfaman Edison. Ajnŝtajn (Einstein) salutas lin germane per la radio de trans la Atlantiko. Multe da artikoloj, fotoj ktp. plenigas la ĵurnalaron. Speciala poŝtmarko uziĝis por signi la jubileon de l' elektra lumo. Jes, oni povas enregistri iom da progreso, ĉar, en la mezepoko, la mondo ne prigloris la scienciston kaj la elpensinton, sed persekutis lin kiel disĉiplon de "la nigra arto". Nuntempe la registaro kaj la Ek-

ABORTO KAJ STERILIGO EN DANUJO

D-ro J. H. Leunbach (15 076)

(1-a daŭrigo)

Nuntempe la virinoj perceptis, ke ne estas nepre necese konfidi la aferon al la sorto; ke ekzistas rimedo por ŝirmi sin kontraŭ la bato kaj, kvazaŭ aranĝante la leĝon por si, eviti la tute misproporcie gravan sekvon de pardoninda petolo. Oni preskaŭ povas diri, ke la malnova koncepto: "bonstata akcidento" ne plu ekzistas. Nuntempe la "bonstata akcidento" plej laŭvorte abortiĝas kaj malaperos antaŭ la fino de la tria monato de l' gravedo.

Do, la virina protesto kontraŭ la naskado de nedezirataj infanoj akiris fortan venkon en malgranda socia klaso. Sed la protesto rapidege disvastiĝis tra la tuta socio. La fakto, ke ĝi ankoraŭ tute ne atingis kompletan venkon, devenas nek de manko de volo flanke de la virinoj, nek de moralaj skrupuloj pri la praveco de la klopodo eviti la sekvojn de peka volupto. Kontraŭe, tiu malsukceso devenas nur de la senpoveco de la virinoj efektivigi sian volon.

La leĝo starigis severan punon kontraŭ abortigo, kaj tial la kuracistoj kaj publikaj hospitaloj ne donas sian helpon. La sekvo estas, ke la virinoj klopodas helpi sin mem. Se ni havus je nia dispono ian certan, sendanĝeran kaj facile haveblan metodon por ĉesigi gravedon, nur tre malmultaj nedezirataj infanoj iam vidus la lumon. Sed ĝis nun mankas tia metodo.

Mi kredas, ke post nelonge ni povas disponi metodon, tiom facile aplikeblan kaj sendanĝeran, ke ĉiu kuracisto povos ĝin uzi kaj senti sin prava ĝin uzante en la hejmoj de la virinoj, tiel evitante restadon en hospitalo aŭ kliniko.

Dum iom da tempo mi mem uzis tian metodon, kaj mi kredas, ke ĝi ludos tre gravan rolon estonte. La metodo estas inventita de germana ĥemiisto Hajzer (Heiser), kiu helpinte al pli ol 11 000 virinoj forigi nedeziratan gravedon, estis kondamnata je trijara enkarcerigo.

La metodo konsistas el tio, ke oni metas antiseptan paston en la uteron. Tio ĉesigas la gravedon, kaj la embrio estas elpelata post unu-du tagoj, tute same kiel ĉe ordinara aborto. Ĉe la 11 000 kazoj de Hajzer ne okazis eĉ unu morto, nek iaj komplikaĵoj; kaj laŭraporte nenia posta kuracado montriĝis necesa en iu ajn kazo.

Ĉe kelkaj kazoj, al kiuj mi aplikis la metodon, kaj ĉe kiuj aliaj kuracistoj observadis la pacientinojn en kliniko, la metodo montriĝis bonega. Oni intencas elprovi ĝin ĉe pli multaj kazoj antaŭ ol publikigi la rezultojn. La konsisto de la pasto estas ankoraŭ la komerca sekreto de Hajzer kaj eble ankoraŭ ne atingis sian finan formon. Kredeble ne daŭros longe, ĝis kiam ĉi tiu metodo estos ĝenerale konata, kaj mi kredas, ke ĝi helpos efiki, ke la punoj fariĝu neefektiveblaj.

Do, ankoraŭ la virinoj ne konas facilan rimedon por abortigi. Pro tio, kaj nur pro tio — ne pro ia "respekto al la disvolviĝanta vivo" aŭ pro timo pri puno — estas eble ankoraŭ devigi al virinoj naski infanojn kontraŭ sia volo.

Tiaj certe estas la kondiĉoj en Danujo kaj la aliaj skandinavaj landoj, kaj ankaŭ en Germanujo. Estas kredinde, ke ili estas samaj en Anglujo, Usono kaj Francujo — unuvorte, tute tra la hejmlandoj de nordeŭropa kulturo.

En landoj forte katolikaj de suda Eŭropo la Eklezio verŝajne tiom firme regas la moralon, ke la protesto kontraŭ nedezirataj infanoj kredeble restos sub-

lezio rezervas la kondamnon por la pensantoj pri sociaj ŝanĝoj, ekzemple por la komunistoj agitantaj en Suda Usono, kiuj ĵus kondamniĝis je 7—20 jaroj da malliberigo pro akuzo, ke ili mortpafis la policestron, kiam li kun subuloj penis perforte eniri la tendaron de la strikantoj...

Edison ĉeestis la lernejon nur dum 2 monatoj kaj liaj instruistoj diris, ke li estas stultulo. Je la 22-a vivjaro li komencis studi, enketi kaj eksperimenti kaj nun en sia 82-a jaro oni notas je lia kredito sennombrajn elpensaĵojn. Ĉefe oni povas nomi la plibonigon de la elektra lampo, la kreon, aplikon kaj utiligon de l' elektra forto, la gramofonon kaj freŝdate la kombinon de sono kaj bildo en la kino. Ĉar al Usono mankas kaŭĉuko, li penas en sia grandega laborejo fabriki ĝin sinteze.



Kompreneble, kiel en aliaj antaŭenpaŝoj, la elektro-lampo ne venis el unu nacio. Scienca daŭra progreso ĉiam konsistas el supernacia kunkreado kaj kooperado. Farade (Faraday), Hertz, Maksŭel (Maxwell) kaj sennombraj aliaj eksperimentis kaj malkovris antaŭ 75 jaroj elektroforton mem. Germano antaŭ Edison elpensis tian lampon. En Britlando laŭleĝa patento ekzistis en jaro 1841, kaj la fabrikistoj, notinde J. Svan (Swan), produktis la inkandeskan lampon antaŭ la Usona Interna Milito (1861/65). Sed Edison plibonigis la fibraĵon en la lampo per uzado de karbonigita kotono kaj poste de palmfolio. Li plibonigis la vakuon. Li unue uzis platenon por la metalfadeno en la kondukado de la elektro-forto kaj unue kunigis serion da lampoj en sistemo priservata de centra generatoro. Tiel venas la moderna lumado en jaroj 1879/81.

Lasttempe la ekleziuloj forgesas ataki Edison pro lia "ateismo". Kiel fari tion ĉe la lumo de lampo elpensita de nekredulo mem? Lia sekretario sugestas freŝdate la ideon, ke Edison nun kredeble ne neas la ekziston de "Unu Superega Estaĵo". Edison dume ankoraŭ daŭras sen ia supernatura helpo elpensi, apliki, kombini sennacie la ideojn de alilanduloj laŭ sia praktika genio. Bedaŭrinde, ke la menso tiom prokrastas apliki sciencon en sociaj rilatoj.

(488)

OKAZE DE KOREKTO

En "S-ulo" n-o 260 aperis artikolo "Du Pioniroj forpasis el la mondo" de K-do Starr (488). En ĝi li uzas la terminon "pensilvania - holandanoj" tiel montrante sian miskomprenon pri la usonana uzo de tiu termino. "Pennsylvania dutch" signifas loĝantojn de la ŝtato Pensilvanio de germana deveno, jam de la Revolucio. La angla vorto "dutch" signifas holandano, sed ordinaraj usonanoj nomis tiujn germanojn (kaj aliajn) "dutch" (elparolu doĉ) misprononcante la germanan vorton "deutsch". Tio montras, kiel oni povas perfekte scipovi la lingvon, kiel mi persone povas atesti pri K-do Starr, sed malgraŭ tio mistraduki vorton, frazon aŭ sencon, se oni ne konatiĝis kun la idiomo, dialekto aŭ idiotismo, kiu estas surloke uzata. La redaktoroj de niaj gazetoj ne povas scii ilin ĉiujn, kaj tial la respondeco restas ĉe la verkantoj.

Okaze mi sentas min devigata rimarkigi, ke la plejmulto da artikoloj pri "aktualaĵoj", kiuj aperis en "S-ulo" el Usono, estis supraĵe verkitaj kaj ofte montris aŭ nescion pri faktoj aŭ tendencan partiecon, kiu havas nenian rilaton al faktoj. Pro tio ni, la malnovaj SAT-anoj ĉi tieaj, havas la rajton konjekti, ke ankaŭ al la artikoloj el aliaj landoj mankas vereco. Ankaŭ pro tio ni ne povas kulpigi nian gvidanton kaj redaktorojn.

Se ni do kritikas la burĝajn gazetojn pro mensogaĵoj, ni unue gardu nian propran fidindecon. Ni esploru nin mem, antaŭ ol ni prenas plumon en nian manon, ĉu ni estas kapablaj honeste raporti pri la aferoj, kiujn ni intencas pritrakti.

Antaŭ ĉio ni lasu al francaj SAT-anoj verki aŭ traduki pri Francio, al japanaj pri Japanio ktp. La artikolo pri Usono, kiun la alĝeriaj K-doj tradukis, baziĝis sur faktoj, sed tio estas escepto, kiu nur pruvas mian argumenton. La tradukintoj nur tradukis, ĉar ili ŝatis la enhavon, sed ne ĉar ili estis konvinkitaj pri ĝia vereco. Ili ne sciis. Nia legantaro havu motivon fidi al la raportoj en niaj gazetoj.

SAT-anoj enmigrintaj aliajn landojn, se ili sentas, ke ili havas talenton imagan, verku siajn personajn impresojn, sed ne nomu ilin aktualaĵoj. Tiel niaj redaktoroj povus trakti kaj uzi ilin kiel tiajn.

Georgo Saville (SAT-ano 1092).

LA MULTKOLORAJ, ILUSTRITAJ POŜTKARTOJ DE SAT

estas haveblaj ĉe la Administrejo de SAT, Colmstrasse 1, Leipzig O 27

---

premata ankoraŭ multajn jarojn; sed la demando temas nur pri la nombro da jaroj, dum kiuj oni povas forpremi la proteston.

Nu, la kondiĉoj de mi priskribitaj estas en stato de fundamenta nefirmeco. Sed la nefirmeco ne estas pli granda ol ĉe multaj aliaj kondiĉoj en socio organizita laŭ privat-kapitalista sistemo. Tie ĉi, kiel en tiom da aliaj sferoj, la suferantoj estas la laboristoj, tiuj malriĉaj kaj ekspluatataj amasoj, kiuj jam antaŭdestinite devas porti la plej pezajn ŝarĝojn. Kaj sur la plej malfortan duonon, nome la laboristinojn, falas plej peze la ŝarĝo de l' deviga naskado.

La viro de la superaj klasoj povas forgesi la problemon kun afabla rideto. ĉar lin ĝi neniel tuŝas. La virino de la supera klaso ne ĉiam evitas korpan aŭ psikan difektadon, sed ĉi tiuj estas kuraceblaj.

La viro de l' laborista klaso estas peze premata de la bezonoj de granda familio kaj malsana edzino. Sed la plenan ŝarĝon devas porti la virino de la laborista klaso.

Troviĝas, tamen, multsignifa diferenco inter la aborta problemo kaj la plimulto el aliaj sociaj problemoj. La plimulton el la maljustaj kaj nefirmaj kondiĉoj, kiuj devenas de la kapitalista sociordo, ni povos forigi nur, detruante tiun sociordon favore al nova kaj pli bona. Sed ekzistas almenaŭ teoria eblo solvi, pli-malpli kontentige, la abort-problemon, eĉ en la kadro de l' kapitalista socio.

Ni iru rekte al la radiko de l' afero kaj esploru la efektivajn kaŭzojn de la malbono atakenda: La potenco movanta estas la protesto de la virinoj kontraŭ naskado de nedezirataj infanoj.

La deziro je la rajto de mem-decido rilate al naskado estas kultura progreso gravega kaj necesa, kiun ni prave bonvenigos. Ni lasu ĉiun provon kontraŭstari ĉi tiun evoluon al eklezioj, faŝistaj kaj aliaj malprogresemaj potencoj! Nia problemo estas tiom disvastigi scion pri kontraŭgravedigaj metodoj, ke la nedezirataj gravedoj okazos nur tre malofte. Jen la plej radika kaj efika metodo batali kontraŭ la abortado. Ĝi estas la plej bona kaj rekomendinda maniero.

Sed ni devas bone memori, ke ĉi ĉio ne sufiĉos por la bezonoj de la momenta stato. Ĉar la kontraŭgravedigaj metodoj ankoraŭ ne estas sufiĉe perfektaj. simplaj kaj konataj; kaj sendube ankoraŭ multaj jaroj forpasos, antaŭ ol ni povos atingi la celon.

Aliflanke oni povas certigi al ĉiuj virinoj same bonan helpon, kia estas nun havebla al la malplimulto en la supera klaso. Ni almenaŭ povas, ĉiuokaze en la plej progresintaj landoj de nia kultura rondo, provizi al ĉiu virino, kiu deziras aborton, la helpon tiele, ke la danĝero al ŝiaj sano kaj bonstato estas malgrandega.

Ĉi tiu estas la agmaniero, kiun oni alprenis en Sovetio; kaj ĉi tiel montriĝis eble atingi sufiĉe kontentigan solvon. En Sovetio, tamen, la nombro el hospitaloj kaj profesia edukitaj kuracistoj ne estas sufiĉe granda por ebligi tujan kaj kompletan forigon de la danĝera neregulita abortado. Tamen, la rusoj rajtas atentigi nin pri nepre bonaj rezultoj.

En la nordaj kaj okcidentaj landoj de Eŭropo estus eble provizi al ĉiuj virinoj la necesan helpon, se ni nur povus efektivigi la postulatan ŝanĝon de la leĝo.

Sed, finfine: ĉu tio estas afero nepre neebla en kapitalista socio?

Ĉi tiu demando ne estas respondebla per simpla "jes" aŭ "ne".

(Daŭrigota)

FAKTOJ KAJ KOMENTOJ

La homaj ruinoj de la milito

Laŭ la rezultoj de la plej nova nombrado de majo 1929 sumiĝas en Germanio la nombro de la subtenrajtaj militinvalidoj je 807 596 (en majo 1928 je 761 294); inter tiuj estas 344 396 plenkripluloj laŭleĝe statistikitaj. Sekve la nombro de la militinvalidoj ne malpliiĝis, sed pliiĝis je 46 302 personoj. La kaŭzo estas, ke ĉe multaj militpartoprenintoj poste sentiĝis la militdomaĝoj, kaj ili per siaj tiucelaj organizoj sukcese atingis la subtenon. Metisoldatoj (eksai) ekzistis en 1929: 58 446 (en majo 1928: 58 917). Ĉe la familianoj postlasitaj ni havas jenan rezulton: Vidvinoj sume 361 040 (en majo 1928: 359 560), duonorfoj 652 014 (en majo 1928: 731 781), plenorfoj 51 917 (en majo 1928: 56 623), gepatraj partoj 152 504 (en majo 1928: 148 230), gepatroj 76 732 (en majo 1928: 73 852), partsubtenatoj 125 000 (en majo 1928: proks. 60 700).

Tiuj ĉi nudaj ciferoj diras al ni multon pri la "glora" milito, kaj certe ekzistas ankoraŭ multaj miloj da homoj, kiuj plimalpli suferas pro la estinta milito, sed al kiuj la frazo: "La danko de la patrolando estas al vi certa" nur sentiĝas kiel moko. Krome, kiom da edzecoj kaj fianĉecoj estas detruitaj per ĉi tiu abomena kapitalista ludo? Ĉe ĉiu sane pensanta homo, tia skandalo ne povas esti forgesata. Rolo.

Infan- k junular-ekspluatado en Italio

Se oni hodiaŭ trapasas Italion, ankaŭ la plej supraĵa observanto rimarkas la treege grandan nombron da laborantaj infanoj kaj gejunuloj. La Statistika Centra Instituto sciigis antaŭ nelonge kelkajn nombrojn pri la infan- kaj junular-laboro en la industrio. Inter la ĉ. 3,2 milionoj da industrilaboristoj troviĝas laŭ tiu oficiala statistiko ne malpli ol 718 480 en la aĝo de 6 ĝis 18 jaroj, t. e. preskaŭ kvarono de l' tuta gelaboristaro. Teritorie la en industrio okupataj infanoj dispartiĝas jene:

Norditalio
471 680 = 22% de l' tuta gelaboristaro
Mezitalio
91 200 = 19% „ „ „ „
Suditalio
101 840 = 26% „ „ „ „
Insuloj
53 760 = 28% „ „ „ „

La sama statistiko sciigas, ke la duono de l' infanoj kaj gejunuloj okupataj en la norditala industrio estas knabinoj; en Mezitalio tiaj estas 38%, en Suditalio 27% kaj sur la insuloj 18%, kalkulataj laŭ la tutkvanto da infan- kaj gejunul-laboristoj.

La salajro de tiuj ĉi gejunuloj estas ĉe labortempo 10- ĝis 12-hora tage 0,20—0,30 dol. po tago. La infanoj ricevas po tago 0,07—0,12 dol. ĉe la sama labortempo.

Laŭ Bulteno de "Intern. Kontraŭfaŝista Oficejo".

DISKUTEJO

Ĉu por aŭ kontraŭ la raciigo de l' laboro?

Nia marista K-do 1453 vidis en Bejrut, ke tie la "franca kulturo" ne enplantiĝis; ke en la haveno estas nur du "kranoj" (Mi supozas, ke kuŝas tie preseraro: devus esti argano = levmaŝino) k sekve, ke la laboristoj devas porti sur la dorso pezajn ŝarĝojn. Plie, tiuj homoj laboras dum 12—14 horoj tage k sin nutras nur per pano k melono.

Mi tute ne pridubas la verecon en la raporto de nia K-do. Estas almenaŭ bedaŭrinde, ke li ne konigis siajn konkludojn pri la de li observitaj faktoj. Mi ŝatus scii, ĉu li estas por aŭ kontraŭ la raciigo de la laboro. Se li estas "por", nu, oni devus starigi en Bejrut — k en ĉiuj havenoj — kiom eble plej da fortaj k perfektaj lev- k transportmaŝinoj. El tio rezultus, ke multaj ŝarĝportiloj senlaborigus homojn, kiuj poste eĉ ne plu povus aĉeti "panon k melonon". Se li estas "kontraŭ", kial do li riproĉas mankon de "franca kulturo" en Bejrut?

En Francio k alie plej "maldekstraj" laboristaj organizoj estas kontraŭ la raciigado; ili do devus danki al la Bejrutaj ekspluatistoj pro la tiea neraciigado!

Al la problemo eble ekzistas alia solvo, nome, ke la Bejrutaj laboristoj organiziĝu, klaskonsciiĝu k postulu pli mallongan labortempon k pli altan salajron, ke tiucele ili kuniĝu kun ĉiuj havenaj ŝarĝportistoj en la mondo por havi pli da ŝancoj batali sukcese. Sed tia rimedo ŝajnas al pluraj "revoluciuloj" tro skema, eĉ naiva!... Ĝi cetere postulas la alprenon de esperanto...

Kion opinias K-do 1453 pri tiu problemo, tion oni ne povas ekscii per lia artikolo. Sed eble li nur celis liveri argumentojn al la vegetaranoj, montrante, ke homoj povas esti tre fortaj, ke ili povas labori tage dum 12—14 horoj, sin nutrante nur per melono k pano.

Almenaŭ mi deklaru, ke estas dezirinde, ke la Gek-doj, kiuj verkas por nia gazeto, eldiru klare sian opinion por ne lasi la spiriton de la legantoj en granda necerto pri la konkludoj de la artikolo. Mi tamen ne volas supozi, ke K-do 1453 havis la nuran deziron babiladi ion ajn por pasigi la tempon.

SAT-ano 601 (Vegetarano).

Penseroj pri nudismo

Vestita, mi eniras delikate la nudisman kampon.

Ŝajnas al mi tiom ridinde, vidi homojn senvestaj, kiel bestojn vestitaj. Kial? Eble ĉar la bestoj plejofte havas proprajn vestojn el felo, plumaro, konko, kiraso k. c., dum homoj antaŭlonge formetis sian hararon, ŝanĝante ĝin en la veston de aliaj bestoj. La skotlanda verkisto Karlajl (angle: Carlyle) similigis nudan homon al forkiĝinta rafano, sed eble pli ĝuste devus esti senfeligita kuniklo.

Dum tiom longa tempo la homoj vestis sin artefarite, ke ŝajnas nun kvazaŭ pli nature vesti sin ol sin montri nuda.

Fizike, nudismo taŭgas nur en perfekta klimato. En malvarma, ni devas porti vestojn por ricevi varmon, en tropika, por nin protekti de la tro arda suno. Do, nudismo taŭgas por nur malgranda parto de l' tero aŭ en nur ioma parto de l' jaro. Neniam ĝi povos esti universala, sekve, ĉiam ĝi devus aspekti stranga... artefarita.

Oni aŭdas, ke estas "sincera" esti nuda. Ankaŭ eble estus sincera lasi la kap-harojn k barbon kreski ĝis... ili endanĝerigus la sinceran nudecon.

Oni ankaŭ aŭdas pri "burĝa antaŭjuĝo" rilate nudismon. Sed burĝinoj ĝenerale tre dekoltas sin vespere k nun reduktas la ban-veston ĝis preskaŭ nulo (almenaŭ laŭ la bildoj, kiujn mi vidis pri modaj mar-urboj). Ili unue, ankaŭ, komencis porti la krur-vidigajn jupojn k estas ĉiam pretaj porti (aŭ ne porti) ion ajn laŭ la modo.

Sed... kuraĝon, genudismuloj! Eble via celo estos atingita laŭgrade, ĉar oni povas rimarki multe pli da senĝeneco rilate la montron de l' korpo, ol antaŭ, ni diru, dek kvin jaroj; do, povas esti, ke baldaŭ, kiam la klimato tion permesos, ni vidos grandskale nudecon, sen la helpo de iu ismo. E. K. L.

Pri anoncoj kaj vegetaranoj

1. Mi tute ne pledas por tiaj (priedziĝaj) anoncoj; sed se mi ĝuste pripensas, mi ankaŭ ne povas kondamni ilin, ĉar la K-doj, kiuj enpresigas ilin, certe ne trovas per alia vojo homojn al ili plaĉajn.

2. Mi treege miras pri la vortoj de K-do 10 380 pri vegetaranoj. Li eble tute ne komprenas la etikan sencon de la vegetarismo. Tutcerte vegetaranoj estas pli bonaj homoj ol la viandmanĝantoj, ĉar ili ankaŭ pensas pri la bestoj, kiuj ne povas defendi sin. Se homoj interbatalas, ili ja mem estas kulpaj. Se estas milito kontraŭ kapitalistoj, tiam ja la laboristoj scias, kial oni eble mortigos ilin. La laboristoj ja nur bezonas unuecon, por ke ne plu ekzistu mortigado. Sekve ili mem estas kulpaj je ĉio.

Sed la pacemaj bestoj ne povas agi tiel k ĉar ili estas malfortaj, oni ilin prenas kiel manĝaĵon. Se ie estas hommanĝulo, li estas granda krimulo, sed se oni mortigas bestojn, tio estas memkomprenebla. Je tio oni rimarkas la duoblan moralon de la homoj k ankaŭ de la laboristoj. Kiu volas esti plenvalora etike k estas hom- k kompreneble ankaŭ best-amiko, — k en tiu eco nur oni indas sin nomi homo, — tiu certe ne aprobas la bestmortigadon, sed estas vegetarano. Kaj kiu amas sian korpon k ne volas ruinigi ĝin, estas vegetarano. Nun al la tielnomata "burĝa" flanko: La vegetarismo estas tute laborista afero, pli ol burĝa. Ni ne deziras al ni esti mortigotaj de la kapitalismo, k ni nur rajtas tion, se ni mem donas bonan ekzemplon. Ni neniun volas detiri de la klasbatalo, ni ankaŭ ne estas pacifistoj...

K-dino 1615 (Germanio).

SENNACIULA SCIENC-KULTURA PAĜO

N-o 21 Sub la kontrolo de Scienc-Kultura (Akademia) Sekcio de SAT. Redakci-adreso: Dim. Snejko, Minsk, Poŝtkesto 33 (Sovetio) N-o 21

AL LA LEGANTARO

La plej bonan eĥon ricevis nia paĝo medicina. Jam pli ol 12 leteroj kaj PK alvenis, kaj ĉiuj el ili aprobas nian iniciaton aperigi medicinajn artikolojn en nia Paĝo. Precipe estas petataj artikoloj popular-sciencaj pri "Ideala dieto", "Malbonaj dentoj kaj malsanoj de stomako", pri tuberkulozo, vegetarismo, tabakfumado, alkoholtrinkado, vivsekco, vakcinado, sanigmanieroj en nutraĵo, laboro, ripozo, dormo, loĝejo, vestaĵo ktp. ktp. Pasis nur kelkaj tagoj[1] post la apero de nia n-o 19, sed ni jam havas 12 eĥojn! Certe tiuj deziroj devas esti kontentigataj. Niaj SAT-kuracistoj verku ĉiuj 1 aŭ 2 artikolojn.

Redaktoro.

ĈU FUMI?

(Kelkaj faktoj)

1. Oni fumas ĉie, en ĉiuj landoj kaj ĉiuj: viroj, virinoj kaj eĉ infanoj. Oni uzas tabakon pli kaj pli ĉiujare. En 1905 en Norda Ameriko oni uzis 3½ bilionojn da cigaredoj, en 1918 — jam oni uzis 46 bilionojn.

2. Ĉiuj fumantoj bonege memoras sian situacion post la unua forfumita cigaredo. Eĉ ne necesas priskribadi tiun situacion! Kiun influon havas fumado je homa organismo?

3. Influo je digestaj organoj. Dentoj fariĝas nigraj de tabakfumo. Dentemajlo fendiĝas. Mikroboj daŭrigas detruadon de l' dentoj. Difektiĝas salivado. Ofte kun la salivo oni glutas la kunmetitajn partojn de la fumo. Stomako komencas malbone labori, ĉar ĝi veneniĝas de fumo. La fumo malfortigas la mukan kapsulon en la buŝo. Kaj la gorĝo fariĝas pli oportuna por infekto.

4. Influo je spiraj organoj. Tabako incitas la mukan kapsulon en spirgorĝo, bronkoj; rezulte oni ofte trovas ĉe fumantoj tuson, spiregadon, sputaĵon, pli malrapidan enspiradon. Muka kapsulo tre intense produktas mukon. Aperas sputaĵo. Oni ĝin elsputas. Tuberkulozaj malsanuloj tiele tre facile disvastigas infekton.

5. Influo je koro kaj sangvazoj. Ofte fumantoj rakontas pri malsanoj en la koro, pri malbona funkciado, pri malregulaj korbatoj. Eĉ ekzistas speciala malsano nomita tabaka kora angino. Post la fumado la koro batas pli rapide, sed poste ĝi baldaŭ laciĝas kaj laboras jam lacigite. Pro fumado sangvazoj fariĝas pli mallarĝaj.

6. Fumanto havas malbonan memorkapablon, tre ofte t. n. "tabakblindecon" kaj malbonan aŭdkapablon.

7. Vere nikotino komence ekscitas homon, sango alfluas al cerbo, la sangvazoj larĝiĝas. La cerbo laboras nur ŝajne bone; post tiu momento komenciĝas malvigleco, premado. Sangvazoj mallarĝiĝas. Cerbo restas sen sango! Neŭrastenio estas ĉefe la rezulto de fumado. Homoj fumas unu cirgaredon post la alia. Ili fariĝas dependaj de tabaka veneno.

8. Ofte pro tabako homo fariĝas malpli vigla, cerbo malbonege laboras. La fumado influas je infanoj, virinoj kaj junularo pli ol je viroj. Inter laboristoj plej multe mortas tiuj, kiuj laboras en tabaka produktado (tabaka — 1,60%; vitra 0,99; poligrafa 0,86; metala 0,74 ktp.).

9. Tabakfumado forprenas de laboristo multege da mono.

Ĉu tiuj faktoj ne sufiĉas? Do, pripensu! Ĉu fumi?

Doks.

De Redakcio. K-doj fumantoj, vegetaranoj, alkoholkontraŭuloj kaj alkoholamikoj, vivsekcanoj, kuracistoj k aliaj, skribu viajn artikolojn por nia Paĝo!

[1] Mi nur antaŭ 4 tagoj ricevis "S-ulo"n k dum 4 tagoj venis 12 eĥoj!

SENLABORECO INTER INTELEKTULOJ EN JAPANIO

Kiel unu el la lastaj rimarkindaj socifenomenoj en Japanio ni povas montri senlaborecon inter intelektularo. En la pasinta duonjarcento, japana kapitalismo progresis per grandaj paŝoj; dum ĉiu milito ĝi marŝis rapidege al pli alta ŝtupo. Precipe dum la mondmilito la ekonomia vivo de Japanio atingis al la zenito pro la florado de l' kapitalismo kaj multe da altgradaj lernejoj estis fondataj pro abundiĝo da studentoj, kiuj deziras akiri bonan vivon post sia elgradiĝo (forlaso de l' lern-institutoj), kaj tiu tendenco daŭris ĝis post la milito.

Dume la ekonomia stato malvigliĝis subite. Sekve la bezono je studentoj por dungiĝi ĉe la kapitalistoj, malgrandiĝis proporcie je grandiĝo de nombro da studentoj. Kune kun tia fenomeno sociaj kontraŭdiroj grandigis sian skalon; laboristaj movadoj vigliĝis; komunistaj, socialistaj ideoj enpenetris profunden intelektularon.

Kaj jaron post jaro senlaboreco inter elgradiĝintoj el kolegioj, universitatoj, intensiĝis. Komprenu tion per jenaj ciferoj:

	1912	1922	1924
Nombro da universitatoj	16	26	32
„ „ kolegioj	84	115	129
„ „ elgradiĝintoj	5843	17 674	22 484

Kompare kun tia grandiĝo de nombroj da lernejoj, elgradiĝintoj, kiel malgrandiĝas proporcio je bezono de dungado! Jenaj ciferoj montras proporcion de dungitaj elgradiĝintoj al la senlaboraj:

1923 82%	1925 66%	1927 64%
1924 75%	1926 59%	1928 54%

Preskaŭ la duono de elgradiĝintoj el kolegioj, universitatoj ne povas trovi laboron. Krom tio, la nova registaro deklaras kaj agas por raciigi japanan ekonomian vivon, ŝparante multe da mono, forpelante amason da homoj kaj raciigante laborprovizon. Senlaboreco tute enpenetras la vivon de l' intelektularo; la mezklasano ĝisfunde, kaj intelektuloj senlaboraj pli kaj pli amase kuras al la tendaro de l' proleta fronto.

Tokia SAT-ano.

EL LA VIVO KAJ SCIENCO

Kaverna esploro

En Hohenlimburg (Vestfalio, Germanio) oni malkovris ĝis nun nekonitan kavernon (Ögstal-kaverno). La restado en ĝi estas vivriska, ĉar de la plafono pendas kiel je fadeno malfirme potencaj rokegoj minacantaj ĉe plej eta skuo per falego. La planko estas jam kovrita per tiaj falaĵoj. La kaverno konsistas el du, unu sub la alia, etaĝoj; sub la ĉefa kaverno estas ankoraŭ aparta kaverno, kiu preskaŭ ne estas alirebla. Multaj vespertoj ĉirkaŭflugas la kapon de la invadanto. En la kaverno oni trovis restaĵojn de proks. kvindek rangiferoj (nordaj cervoj), krome ostojn de rinoceroj, kaverna urso, kaverna hieno, praĉevalo kaj bizono; la trovitaj ŝtonaj iloj, verŝajne el la plej antikva ŝtonepoko, estas taksataj 20 000-jaraj.

Homo 2921.

Dieto kontraŭ baciloj

La medicina mondo nun estas interesata per nova sukcesa metodo de kontraŭbatalo al tuberkulozo(ftizo) en ĉiuj ĝiaj formoj, ĉu osta, haŭta, pulma: eble la plej disvastigita malsano en la mondo. La metodo estis dum 25 jaroj ellaborata k elprovata en tuta sekreto de kuracisto Gerson en Bilefeld (Germ.). Ĝi konsistas nur el speciala dieto. Esplorante la urinon de nerv- k tuberkuloz-malsanuloj Gerson konstatis retenon de kloro k mankon de kalio en la organismo, kiuj evidentiĝis kiel helpiloj al pliflorado de la baciloj en la korpo. La metodo donis neatenditajn rezultojn: la dieta manĝaĵo devas esti tute sen salo (=klornatrio) k enhavi kalion, por tio multe da legomoj, salatoj, fruktoj, krudaĵoj vitaminriĉaj, rostaĵoj, bakaĵoj, kuiraĵoj nur rostitaj, bakitaj k kuiritaj en mallonga tempo, por ne senigi la vitaminojn, krom tio speciala preparaĵo Mineralogen, kiu enhavas la mankantajn kaliajn salojn k iomete da kalcio. La metodo estis poste elprovata de prof. Saŭerbruĥ en la Münĥenaj klinikoj kun granda sukceso. Tiel per malagrabligo de la medio en homa korpo la baciloj estas nature mortigataj.

Homo 2921.

Nia poŝtkesto

4358. Denove ni turnas vian atenton al nova titolo de nia Paĝo. Sekve pripensu la enhavon de artikoloj. Senditan ni uzos.

11 024. Studenta vivo aperos en n-o 23.

K. Hubricht. Sendu kontraŭ medicinaj artikoloj.

8008, 14 771, 7381. Dankon pro PK. Ni esperas ricevi vian helpon en nia laboro.



N-o 9 — 4-a jaro Gvidanto k kompilanto: O. BÄSSLER, Ebermayer-Str. 8, I, Leipzig C 1 (Germ.) 28. Novembro 1929

EL NEDERLANDO

Ĉu religio estas privat-afero?

(Esperanto-Servo.) Estas parto de Nederlando, kie preskaŭ tute sole regas la katolikismo, k kie la pastroj havas la potencon. Sed same kiel estas la potenco de la religio, estas la mizero k ekspluatado; tie ankoraŭ ekzistas sklaveco. Tamen en granda farbfabriko en urbo de Sud-Nederlando, kie estas citita stato, komenciĝis striko. Kio nun okazis? Kompreneble estas tie strikrompantoj, ankaŭ kompreneble estas, ke policanoj ilin akompanas al la fabriko, sed... antaŭ la strikrompantoj k policanoj iras du pastroj, en unu mano la kruco, en la alia bastono! La religio nur povas regi per malsaĝeco k sklaveco, k la pastroj ne facile transdonos sian potencon. Religio ne estas privata, sed socia afero!

W. Wessels, Amsterdam.

EL ANGLIO

Eklezio posedas domaĉojn!

(Esperanto-Servo.) La saneca fako de la urbo Glasgov (Skotlando) raportis, ke la socia labor-komitato de l' skotlanda eklezio, posedante laboristajn domojn ĉe stratoj de Glasgov, ne farigas necesajn rebonigojn ĉe tiuj domaĉoj. La loĝeja komitato de la urba konsilantaro decidis, ordoni rebonigojn en intereso de sano k loĝebleco k procesos kontraŭ la eklezio por la kostoj.

J. Lea (12638), Manchester.

EL GERMANIO

Kap-ĉasisto

(Esperanto-Servo.) Multaj el vi verŝajne supozas, legi sub ĉi superskribo artikolon pri indiĝenoj, "sovaĝuloj", kiuj konsideras ĉiun ajn alian genton kiel malamika. Tute ne. Sed des pli pruvas ĉi raporto, ke similaj sangavidaj bestiĝintaj homoj vivas en civilizita lando. La urbo, kiu pro citotaj okazintaĵoj famiĝis, estas Düsseldorf (Rejnlando), enhavante proksimume 450 000 loĝantojn. Tiu homo, kiu jam depost kelkaj monatoj ekscitigas k timigas la loĝantaron (k de semajno al semajno pligrandiĝas la nombro de la viktimoj) havas la strangan kapablecon, ĉiatempe forviŝi ĉiu-ajn postsignon. Ĝis nun li mortigis plej abomeninde 9 homojn. Inter ili troviĝas kvar infanoj (knabinetoj). Krome li vundigis grave k malgrave aron de geviroj k infanoj. Kun speciala plezuro tiu krimulo emas kaŝataki siajn viktimojn, por senkonsciigi ilin aŭ per kaptoŝnuro aŭ per bategoj sur la kapon, por poste mortigi ilin per tranĉilo. Plej strange estas, ke tiu krimulo eĉ interrilatis telefone k skribaĵe kun la ĉi tiea laborista gazetaro k kun la polico. Eĉ desegnaĵe li indikis la lokon, kie li enterigis sian lastan viktimon. La tiurilata malkapableco de la polico, kapti tiun ĉi homan beston, favorigas la konstante kreskantan psikan epidemion, reganta en la popolo. Dume la fantomo de la kapĉasisto senĝenate rikanas el ĉiuj anguloj de la urbego Düsseldorf.

SAT-perantoj.

EL FINNLANDO

108 politikaj gemalliberuloj malsatstrikas

(Esperanto-Servo.) La 10-an de novembro komenciĝis en malliberejo de Tamonisaari (kie estas enkarcerigitaj "kontraŭŝtataj krimuloj") malsatstriko. Du tagojn poste aliĝis al la striko ankoraŭ 10 malliberulinoj ("kontraŭŝtataj") en Haŭceenlinna. La strikantoj postulas pli humanan traktadon, forigon de la punlaboro, kuracadon al la malsanuloj, pli bonan nutraĵon ktp.

F. G. L. (14 142), Tampere.

Raportoj estu koncizaj, sed multenhavaj!

EL RUMANIO

En "demokrata" ŝtato policistoj konfiskas lab. gazeton

(Esperanto-Servo.) Komence de novembro en Bukarest aperis nova gazeto, sub titolo "Munca Silnica" (Punlaboro), redaktita de Dobrogheanu Ghera, kiu post 36-taga malsatstriko estis liberigita el malliberejo. Tuj post apero la gazeto estis konfiskita, malgraŭ la leĝo, kiu rajtigas disvastigi ĉiujn presaĵojn senĝenite. Amasiĝis tuj multaj laboristoj, kiuj protest-manifestaciis kontraŭ nia "demokrata" registaro.

Tila (13 828).

EL BULGARIO

Unuiĝo de la revolucia studentaro

(Esperanto-Servo.) Post longaj 4-jaraj penoj k bataloj la revolucia ruĝa studentaro en Bulgario baldaŭ havos sian unuiĝon. Okazis jam antaŭ-fondiĝkunvenoj, k certe post plej-multe unu monato la "Bulgara Ĝenerala Popola Studenta Unuiĝo" estos fondita. Ĝis nun ekzistis nur la faŝista "Bulgara Nacia Studenta Unuiĝo", kiu ĉiam fuŝis la batalojn, la strikojn ktp. de la studentaro. Ekzistas ankaŭ "akademiaj societoj" ĉe ĉiu fakultato, sed ili estas "pure sciencaj", neniam emas batali. Krome, ili estas sub komando de la faŝistigita universitata potenco, kiu malpermesas ĉiun batalon: ekz. la "akademia societo" de la agronomoj estis nuligita, ĉar la revolucia studentaro gvidis ĝin. La fondota revolucia studenta unuiĝo estos profesia k politika organizo. Ĝi batalos ne nur por studentaj aferoj, sed ankaŭ por likvidigo de la "leĝo por defendo de la ŝtato", por releĝigo de la komunista partio k komunista junularo, kontraŭ blanka teroro k faŝismo ktp. Certe, estos elpelitaj el la universitato multaj ruĝaj studentoj, sed la unuiĝo fondiĝos spite ĉio. Ja estis antaŭjare elpelitaj 16 Gek-doj studentoj okaze de studenta striko k kiel redaktoroj de "Studenta Tribuno". Sed la gazeto aperas nun en pli granda eldonkvanto, k estas grava varbilo por la nova unuiĝo. La respondeca redaktoro de la gazeto estas esperantisto, k la redakcio korespondas en esperanto. Adreso: N. Aleksiev, ŝtata universitato, Sofia.

Gol, Sofia.

EL SOVETIO

Socia asekurado en Sovetio

(Esperanto-Servo.) Ne eblas, en malgranda noto mencii ĉiujn specojn de l' socia asekurado en Sovetio: tute senpaga kuracado de gelaboruloj k de iliaj familianoj dum malsano kun konservo por ili plenan salajron; liberigo de laboro de laboristinoj por 16 semajnoj, de oficistinoj por 12 semajnoj antaŭ k post nask-procedo (same estas plene salajrataj); pensiigado de perdintoj laborkapablon (por invalideco, akcidentoj, maljuneco ktp.); asekurado je senlaboreco ktp. Laborulo mem nenion antaŭ- aŭ postpagas por la asekurado kiel en kapitalistaj landoj. Nu, jen buĝeto de tiuj organizoj por socia asekurado en jaro 1929/30 estas 1 miliardo k 300 milionoj da rubloj ĉe 11½ milionoj da asekuritoj.

B. Esperkoro, Samara.

Ni mem donas la monon

(Esperanto-Servo.) Laŭ postuloj de gelaboristoj la soveta registaro eldonis en septembro je sume 750 milionojn da rubloj 3-an gajnprunton por industriigo de la lando. Jam nun la soveta laborularo skribcertigis la aĉeton de obligacioj de l' gajnprunto entute je sumo de 765 milionoj da rubloj — do je 15 milionoj estas superigita la sumo fiksita por eldono de la prunto. La kolektiva skribcertigo de gelaboristoj k geoficistoj donis 605,1 milionoj; kamparanoj — 113,5 milionoj; neorganizita loĝantaro — 46,4 milionoj da rubloj. Ni sukcesas trovi monon por industriigi la landon mem, sen jugkondiĉaj pruntoj de eksterlanda kapitalistaro.

B. Esperkoro, Samara.

RESPONDA PARTO

15 080, 13 059, 1 851, 509. Viaj raportoj ricevitaj; ili aperos en sekv. n-o.

13 851. Via raporto aperos sur "Sporta Paĝo".

13 104. La raporton ni peris al la kompilanto de "Proleta Esperanto-Korespondanto" por uzo.

9-a listo de raportoj en jaro 1929/30

51. Ĉu religio estas privat-afero? W. Wessels, Amsterdam (Nederlando).
52. Eklezio posedas domaĉojn! J. Lea (12 638), Manchester (Anglio).
53. Kap-ĉasisto. SAT-perantoj, Düsseldorf (Germanio).
54. 108 politikaj gemalliberuloj malsatstrikas. F. G. L. (14 142), Tampere (Finnlando).
55. En "demokrata" ŝtato policistoj konfiskas lab. gazeton. Tila (13 828 — Rumanio).
56. Unuiĝo de la revolucia studentaro. Gol, Sofia (Bulgario).
57. Socia asekurado en Sovetio. B. Esperkoro, Samara (Sovetio).
58. Ni mem donas la monon. B. Esperkoro, Samara (Sovetio).

TRA ESPERANTIO

PRI INSTRU-METODOJ

Multe oni diskutas kaj disputas lasttempe en "S-ulo" pri instrumetodoj, kritikante jen tiujn, jen aliajn. Ĉar mi estas gvidinta kursojn dum pli ol 10 jaroj kaj ĉar mi estas ĉeestinta plurajn Ĉe-kursojn, mi volas ankaŭ diri mian opinion, precipe responde al artikolo en n-o 264 de "S-ulo".

Laŭ mi ekzistas du specoj de esp. kursoj: en unuj oni unuavice atentas la gramatikon, donas al la lernantoj gramatikajn regulojn, ilustrante ilin per ekzemploj. La lernantoj legas, tradukas parole kaj skribe. En la aliaj oni zorgas antaŭ ĉio pri la konversacia flanko, oni parolas de la unua leciono esp-e, malmulte legas, tute ne tradukas. Kaj same ekzistas du specoj da lernantoj: unuj havas persistemon, ili estas pretaj uzi sian tutan liberan tempon por gramatikaj ekzercoj kaj teoriaj gramatikaj studoj, — la aliaj ne havas tempon kaj deziras sen granda peno akiri iajn sciojn. Bedaŭrinde la plejparto de viaj kursoj apartenas al la unua kategorio, dum la lernantoj apartenas al la dua. Kiu rezulto do? En la "fundamentaj" kursoj restas nur malmultaj seriozuloj, dum pli ol 50% diskuras post kelkaj "enuigaj" lecionoj. La duaspecaj kursoj estas pli bonŝancaj: la multokupitaj lernantoj venas al ili. Volonte, sciante, ke ili ne bezonas multe penadi hejme, kaj ankaŭ la fundamentuloj ekzercas paroli esp-e dum la lecionoj kaj hejme kompletigas siajn gramatikajn sciojn per helpo de lernolibroj.

K-do Ekström dubas, ĉu rektmetoda instruado estas aplikebla ĉe personoj, ne konantaj la fundamentajn regulojn gramatikajn. Mi diras: jes, nur ĝi estas taŭga por nekleruloj: Tute ne gravas, ke la lernanto dum esp. kurso ellernu la signifon de "substantivo", "adjektivo"; grave estas, ke per konstanta praktikado li kutimiĝu al tio, ke la nomoj de objektoj havas la finaĵon **o**, dum iliaj ecoj finiĝas per **a**. Kaj tion oni atingas ĝuste per rektmetoda instruado. Per ĉiama parola ekzercado oni lernas uzi la diversajn formojn lingvajn, la lernata lingvo iĝas viva por ni kaj estas parolata sen pensoj pri gramatikaj reguloj kiel la gepatra lingvo. Ĉu tiel ne estas plej bone?

La Ĉe-metodo estas brila. Lude la lernantoj akiras siajn sciojn (almenaŭ tiuj, kiuj ĉiam kunparolas; en tiuj ĉi kursoj oni ja respondas ĥore). En la fino de la kurso ili ne havas tute fundamentajn sciojn gramatikajn, sed ili povas libere paroli pri multaj temoj kaj krome — ili havas entuziasmon por la ideo de lingvo internacia kaj emon por daŭrigi la studadon. Kaj tio estas gravega.

K-do E. notas, ke Ĉe-kursanoj diras "mi havis laboris". Eble. Kiel jam aludite, la tuta kurso — li mem nomas ĝin prave "konversacio" — ne donas ĉiujn gramatikajn regulojn, sed instruas per simplaj frazoj kaj vortoj esprimi laŭeble plej multon. La kunmetitajn formojn li ne tuŝas dum la kurso, do ne estas mirinde, se la lernantoj ne scipovas ilin formi. Al la alia riproĉo, ke malgraŭ la multnombraj kursoj mankas instruistoj de esp-o, mi nur volas diri, ke ne ĉiu ja taŭgas por esti instruanto, ne ĉiu havas talenton pedagogian. Ke tamen Ĉe-kursanoj kapablas gvidi kursojn, montras jena fakto: Lastaŭtune Ĉe-kurson en Tartu (Estonio) partoprenis instruistino E. P., kiu antaŭe neniam lernis esp-on kaj venis al la kurso nur por vidi la metodon. Vintre en la kamparo ŝi ne havis parolpraktikon, sed ŝi iom legis. Ĉi-aŭtune ŝi mem gvidis esp. kurson laŭ Ĉe-metodo kun bonega sukceso. Ŝi kapablis tion fari, ĉar ŝi estas pedagogo, ne multaj aliaj. Entute ofte multe malutilas tio, ke gvidas kursojn personoj, tute ne kapablaj por instruado. Ofte estus pli bone, se tiaj kursoj tute ne okazus, ĉar ili nur fortimigas la lernantojn.

La Ĉe-kursoj estas bonegaj ĝenerale, sed miaopinie ili ne estas senŝanĝe uzeblaj por laboristoj: unue, ĉar ilia enhavo estas por proletoj tro "neŭtrala", kaj due, ĉar li tute ne uzas lernolibrojn, dum nekleruloj devas tamen ankaŭ vidi presitan tekston. Mi mem estas bonsukcese uzinta la lernolibron "Petro" kunigitan kun la Ĉe-metodo. Dum la tuta leciono mi parolas kun la lernantoj pri temo, montrata en iu el la laŭvicaj rakontoj en "Petro" kaj kiam la vortoj kaj gramatikaĵoj estas jam enkapigitaj de la lernantoj, mi lasas ilin kolektive legi la rakonton kvazaŭ por kontroli la ĵus akiritajn sciojn. La gramatikon mi klarigas tiel, kiel tion faras s-ro Ĉe, nur en esceptaj okazoj uzante nian nacian lingvon, kaj eĉ tiam ne mi parolas nacilingve, sed la lernantoj, kaj mi nur kontrolas, ĉu ili komprenis ĝuste.

Anstataŭ disputi pri metodoj, kiujn ni ne konas, ni prefere rakontu, kiel ni mem gvidas niajn kursojn kaj kio en ili montriĝis sukcesa kaj daŭriginda, kaj kio ne devas plu esti ripetota.

H. Dresen, Tallinn.

POR KE "S-ULO" RESTU 12-PAĜA!

Belan eĥon vekis nia alvoko en n-o 266. K-do Coll (7998) sendas al ni kiel komencan sumon 10 fr. frankojn k esprimas, ke certe inter la abonantoj estas pli ol 2000, kiuj plue deziras ricevi la 12-paĝajn "S-ulo"jn. Li esperas komence de l' nova jaro povi abonigi pli da lab. esp-istoj en sia loko k admonas ĉiujn K-dojn dume kompensi la deficiton per laŭvola k laŭkapabla alsendo de iom da mono.

Dankante pro la sinoferemo de tiu K-do, ni rekomendas lian ekzemplon al ĉiuj, kiuj komprenas la gravon de l' afero. Nia abontarifo ja ne altiĝis per la plinombrigo de l' paĝokvanto, por ke al ĉiu estu eble aboni la gazeton. Temas nur pri plana varbado de novaj abonantoj ĉiuloke... tiam ne plu necesos pagoj libervolaj de unuopuloj. Certigu al "S-ulo" sanan financan bazon!

NEPRE NI ATINGU LA 4000 ABONANTOJN

EL LA REDAKTEJO

Ni daŭrigu en nia klarigo, pri kio devas atenti bona raportanto. Fakte ja inter nia multnombra Legantaro troviĝas nur malmultaj raportemuloj-verkemuloj. Certe la ĉefa kaŭzo por tiu fenomeno estas la timo vidi malakceptata sian manuskripton ĉe la redaktejo. Nenio tamen estas pli facila ol atingi enpresiĝon de sia artikolo en "S-ulo", se oni nur atentas, ke la laboraĵo havu kelkajn necesajn kvalitojn. La plimulto el niaj kunlaborantoj ja komprenis nun, ke nunecaj, agitecaj artikoloj, kiel tiuj, kiujn enmetas ĉiutagaj tendencaj gazetoj, por "S-ulo" havas nenian valoron. Mi ne insistu sekve tro ofte ripeti la jam plurfoje diriton, prefere mi provu analizi per du ekzemploj, kiajn verkojn plej volonte akceptas la redakcio.

1. Ni supozu, ke verkema, raportema SAT-ano loĝas en regiono de la 0-a horzono, speciale distingiĝanta per ekzisto de ŝtalindustrio. Laŭ la karaktero speciala de tiu industrio sekve modifiĝas labor- kaj vivkondiĉoj de l' tiea laboristo. La ekonomia situacio en la regiono ankaŭ estas aparta. La instigon raporti donas ordinare ia okazo kiel striko, nova laborkontrakto, naturkatastrofo, aŭ la interveno de l' homa racio en formo de ŝanĝita tekniko. Kompreneble la raportanto ne devas limigi sin je simpla konstato de l' faktoj. Li devas rilatigi la okazojn unue al sia persona sperto, sia propra travivo (ni supozu, ke li laboras en la industrio mem); plie li devas scii observi la reefikojn de l' okazoj je sia medio, je tiuj, kiuj ĉirkaŭvivas lin, je konatoj, samprofesianoj, eĉ je aliaj profesioj. Ĉiuokaze devas plene klariĝi al la leganto, kiun ĝeneralan signifon havas la okazo: se temas pri la ŝanĝo en la ĝisnuna stato, kompreneble necesas klarigi unue, kiaj estis la antaŭaj kondiĉoj, por vere komprenigi la tutan signifon de l' okazinta ŝanĝo.

2. Ni supozu regionon malmulte de niaj K-doj konatan en la 16-a horzono de l' globo. Iu K-do loĝas tie aŭ havas okazon trapasi ĝin bonŝance. Li pro-

fitas la okazon por liveri priskribon al "S-ulo". Tia priskribo povas ĉiam interesi, kondiĉe ke ĝi ne limiĝu je eksteraj konstatoj, sed spegulu samtempe la spiritostaton de l' observinto, liajn proprajn subjektivajn sentojn (tio ja ne signifas nepre "kritikon" aŭ "partiecon"). Ĉiu komprenas, ke priskribo senpasia tedas pro sia seko. Tial ĉiun taŭgan priskribon pri naturo, loĝantaro, moroj, laboro, kulturo devas iel travibri la anima stato, la sentrilatoj al la pentrata objekto de l' observanto, de l' priskribanto mem.

Niaj kunlaborantoj zorgu diligente, ke "S-ulo" neniam perdiĝu en abstraktojn, estu forta, altira, ĉar vivoplena kaj tial esence kleriga. N. B.

MALOFTE ONI RENKONTAS ESPERANTISTOJN!

La titolo mem de tiu ĉi artikoleto estas la ĝenerala esprimo de preskaŭ ĉiuj esp-istoj. Mi mem dum longa tempo argumentis same, sed nun mi ŝanĝis la opinion, laŭ propra sperto. Kiom ajn optikaj estu la vidorganoj de la espistoj, ili neniam vidos unu la alian, preterpasante aŭ eĉ kunlaborante, se la verda stelo restis hejme.

Jen fakto: realveninte Parizon, mi vizitis mian antaŭan mastron por peti laboron. Interkonsentinte, li kondukis min per sia aŭtomobilo al nova laborejo. Tie mi renkontis k salutis kelkajn malnovajn K-dojn. Surprizite, unu el ili, vidante mian verdan stelon demandis min esp-e, ĉu mi estas esp-isto. Mi ankaŭ miris, ne pro lia demando, sed pro lia esp. scio, ĉar antaŭe mi eĉ ne suspektis, ke li parolas Zamenhofe. Dum kelkaj minutoj ni nur parolis en esp-o, dum la aliaj nenion komprenante aŭskultis nin mirigite. Baldaŭ la tuta aro ĉirkaŭis nin forgesante la laboron. Subite alvenas la ĉefo k jen ĉiuj rapidis al sia laboro. Ni tamen daŭrigis la esp. interparolon, k mi rimarkis, ke la ĉefo sagace alproksimiĝas klinante la kapon por aŭdi nian babilon. Malgraŭ ke li ĉiam estis afabla por la laboristoj, mi tamen ne volis ĝeni la laboron plue k decidis adiaŭi mian K-don por min turni al la ĉefo k lin saluti. Sed apenaŭ mi premas la manon de mia malnova amiko, jen la ĉefo alproksimiĝante k ridetante salutas min en esp-o! Denove mi surpriziĝis. Post longa babilado, ni eksciis, ke dum pli ol 6 monatoj tri esp-istoj kunlaboris antaŭe ĉiutage k neniu el ni kapablis vidi unu la alian. Ĉu en tia okazo justas diri, ke malofte oni renkontas esp-istojn? Ne! Oni devas diri, ke malofte oni renkontas esp. insignojn!

Se ĉiuj esp-istoj kunportus la verdan stelon, eĉ ĉe la laboro, kiel ni faras nun, oni multon propagandus, nur per respondoj al la demandoj pri signifo de la verda stelo. Scivolaj demandoj neniam mankas dum la laboro k ju pli, des pli bone por nia esp. propagando. Unu el ili ĝis nun ignoris SAT k estas membro de UEA. Post legado de mia lasta n-o de "S-ulo" li promesis aliĝi al SAT. Pri la alia mi zorgos.

S o a r e s (6727), Paris.

Zamenhofa Saĝo

La tuta laborado en nia afero ne estas io komplika, sed konsistas el jeno: eldonadi, konstante kaj regule eldonadi verkojn, gazetojn, krei grandan, ĉiam kreskantan literaturon, kio ne sole perfektigos nian lingvon, sed elvokos respekton por nia afero multe pli, ol ĉia alia agado, kaj per la forto de sia vivado kaj kreskado aligos al nia afero la tutan mondon pli rapide kaj pli certe, ol ĉiuj plej energiaj teoriaj predikadoj kaj plej rafinitaj agitadoj; ĉar la mondo estimas nur la faktojn.

El "La Esperantisto", 1891.

* * *

Lingvo internacia fortikiĝos por ĉiam nur en tia okazo, se ekzistos ia grupo da homoj, kiu akceptus ĝin kiel sian lingvon familian, heredan. Cento da tiaj homoj estas por la ideo de lingvo neŭtrala multege pli grava ol milionoj da aliaj homoj. Hereda lingvo de la plej malgranda kaj plej sensignifa popoleto havas vivon multege pli garantiitan kaj neestingeblan, ol senpopola lingvo, kiun uzus eĉ milionoj da homoj.

El letero al Kofman, 1901, "Originala Verkaro".

Esperanta movado en Irkutsk (7-a horzono)

Esp-istoj oficiale organiziĝis en Irkutsk en la jaro de Granda Revolucio — 1917 (R u k a v i c i n). SAT-organizo aperis de la jaro 1922 (K r j u k o v). Ĉiujare, komencante de la jaro 1917, dum aŭtuno k vintro regule okazadis kursoj (dum someraj monatoj pro ferioj, pro foresto de funkciuloj ktp. esp. laboro ĉiam haltas). Do sciantoj esp-on en Irkutsk estas multaj, sed kotizpagas regule el ili ne multaj bedaŭrinde. En nuna jaro estas dume 32 SAT-anoj k nur 12 pagintaj SEU-anoj. Fakto estas, ke esp-istoj emas pli al SAT, ol al sia nacia organizo. Ili ne bone komprenas, ke SAT povas kreski nur per laboro de naciaj propagandaj proletorganizoj, kiuj estas kvazaŭ manoj de SAT. En 1929 ĉe ni okazis eĉ ioma malordo en kotizpagoj. Aŭtune ĉio reordiĝas. Ni jam komencis novajn kursojn (Babiĉev, Nepomnjaŝĉij) ĉe distrikta ejo de "Internacia Ruĝa Helpo" (ruse MOPR), kiu donis al SAT sidejon en Palaco de laboro. Nia organizo fariĝis kvazaŭ ĝia fako. Komitato de junkomunistoj en Irkutsk per radio rekomendis oficiale al ĉiuj siaj ĉeloj atenti internacian edukiĝon k lerni "fremdajn" lingvojn, inter kiuj esp-o estas nomita la unua. Sed por atingi tian rezulton estis bezonaj multaj oferoj eĉ de malnovaj komunistoj... Multe efikis ĉie disvastigata propaganda flugfolio, kiu montris rolon de esp-o en sennacia eduko k citis multajn aŭtoritatojn (rezolucion de Marksa Internacio pri signifo de universala lingvo, dirojn de M. Gorkij, Barbjus, A. Ajnŝtejn k. a. pri esp-o). Bruon faris certigo de la folio, ke lerno de "plej gravaj fremdaj lingvoj" estas vere burĝa utopio, ĉar ĝi pro malfacilo de ĉi lingvoj estas neefektivigebla k ne radikale forigas malbonon de multlingveco, sed nur cedeme malfortigas ĝin (ni bone scias, ke lerno de fremdaj lingvoj ankoraŭ longe estos bezonega por proletaro, sed ĝia bezono neniel superos bezonon de t. n. NEP — nova kompromisa ekonomia politiko de Sovetio). Same bone efikis fakta per- k por esp-a propagando de franca K-do, kiu ĉi-cele vojaĝas per originala biciklo tra Eŭropo k Azio k vizitis Irkutskon. Por sukcesigi lian entreprenon tie ĉi multe klopodis fervorega M a j z l i s. Estis aranĝita (Babiĉev, Fomenko) bonege vizitita spektaklo kun esp. ekspozo. Partoprenis bluĉemiza trupo, kies plej multaj esp. numeroj apartenis al lokaj aŭtoroj.



Lukse pentrita esperanta elpendaĵo sur fenestrego de poŝtagentejo en plej vizitata ĉefstrato de Irkutsk. Post fenestrego—gazetekspozejo. La fenestrego respegulas kontraŭan flankon de l' strato.

En majfesto esp-istoj manifestaciis en aparta kolono kun propraj afiŝoj k standardoj. Antaŭe iris kompreneble standardo de Essena SAT-rondo interŝanĝe ricevita per nia 6-a SAT-kongreso

Fundamento de Esperanto (kvinlingva) Pr. 1,— mk.g.
Fundamenta Krestomatio. 160 pĝ. Prezo: 2,50 mk.g.
KABE. Vortaro de Esperanto 175 pĝ. Pr: 2,20 mk.g.
Lingvaj Respondoj de d-ro Zamenhof. 92 pĝ. Prezo: 1,— mk. g.

La kvar klasikaj verkoj sur kiuj baziĝas nia tuta lingvo-uzo, kiuj estas konsililoj kaj helpiloj por ĉiu esperantisto.

Haveblaj ĉe la Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio).

(klopodoj de K-doj Ŝtercenbaĥ, Babiĉev, Poluŝin, Ignatjeva). Inter loka poŝtistaro esp-o same bone sukcesis. Lokaj leterportistoj jam ne bezonas tradukojn de plej neklare skribitaj esp. adresoj. Propagande k ade efikas lukse aranĝita (la klopodoj de Manzurev) esp. elpendaĵo sur fenestrego de poŝta ĉefagentejo en plej multe vizitata strato de Irkutsk. Korespondo kun eksterlando estas sufiĉe vigla (jare ĉ. 500 sendaĵoj). Plej interesaj el eksterlandaj leteroj estas tradukataj (Babiĉev) k gluataj sur arte plenumita (Manzurev) tabulo, kiu pendis en unu klubo. Pri- k peresp-aj artikoloj aperis dumjare en kelkaj murgazetoj de l' urbo. Esp-istoj jam aperis en Jakutsk, Ĉeremĥovo, Usolje, eĉ en Mongolio... Mankoj de nia adado (malakurateco pri kotizpagoj, pri abono "S-ulo"-n, pri vizitado de kunvenoj...) devas esti nepre likviditaj dum nova jaro.

M. Krjukov.

AL NIAJ AŬSTRIAJ GEK-DOJ K KLIENTOJ!

Bonvolu ne plu sendi monon al la adreso de K-do Strasser (Wien), ĉar li pro privataj aferoj ne plu povis plenumi nian perantan laboron. Ĉe ĉiuj aferoj interrilatu rekte kun la administracio en Leipzig k ĉiun ajn monsendon vi direktu al: **R. Lerchner, Leipzig,** poŝtĉeka konto **Wien-D, 137 725**

RADIOAŬSKULTANTOJ! NECESA ENKETO!

Ĉiuvendrede je 23½-a horo parolas la Leningrada radio-stacio esp-lingve. K-do Urbano per sia basvoĉo tre bone disaŭdigas. La 3-an de nov. eĉ nia radiokolektivo aranĝis specialan teatraĵon ("Nia standardo estas leninismo") kun speciala orkestro. La radio-spektaklo prezentita de lokaj SAT-anoj estis tre bona k kostis al la stacio multe da mono. Esp. radio-kurso estas enkondukata. Sed nin demandis la estro de l'radio-stacio pri preciza nombro, kiom da alilandanoj aŭskultas tiujn disaŭdigojn. Kion respondi al li? Ni povis malprecize diri, ke oni aŭskultas en Germanio, Aŭstrio, Estonio, Svedio, Danio. Sed kiom — ni ne povis respondi. Certe li ne konsentus elspezi la monon por nur malmultaj aŭskultantoj.

Sekve **senprokraste** helpu al ni, K-doj. por ne fiaski! Ĉiuj devas al ni respondi nepre jenajn demandojn: 1. Ĉu estas dezirataj radio-spektakloj? 2. Kiom da Gek-doj aŭskultas en via urbo? 3. Kiel vi organizas kolektivan aŭskultadon? 4. Pri kiuj temoj vi volas aŭskulti? 5. Ĉu oni pridiskutas niajn disaŭdigojn? 6. Ĉu gazetaro aperigas ion pri ĝi? 7. Ĉu via urba esp-istaro estas informita de vi pri niaj disaŭdigoj?

Oni adresu al: Sovetio. Leningrado. Radio-Centro.

Laŭ komisio de Leningrada Radio-sekcio
P. Tilin (9310).

EKSTER NI

Jena letero trafis en miajn manojn:

"Estimata K-do Eŭtrapel,

"Mi ne scias, kio estas eŭtrapelio k kiu sin kaŝas sub la pseŭdonimo Eŭtrapel. Mi ja vane serĉis tra la tuta Jarlibro k tian SAT-anon ne trovis. Eble la eŭtrapelio estas ia speciala ironio, al kiu oni devas kutimiĝi por kompreni ĝuste viajn dirojn. Nu, ne gravas. Almenaŭ mi parolu al vi tute serioze k provu konvinki vin, ke pastro Rambu estas ĝisoste konvinkita katoliko.

"Kial vi povis dubi pri tio? Devus esti al vi klara, ke ĉiu ajn Rambu-ulo povas fariĝi nur katoliko, se li edukiĝas en katolika lernejo, aŭ protestanta, se tio okazas en protestanta lernejo, islamano, en islama, budhano, en budhana — marksano, en marksana ktp. Maloftaj ja estas la Volter-oj k Renan-oj, kiuj kapablas memstare pensi k liberiĝi el la encerbigitaj dogmoj.

"Ĉe mi forestas ĉia dubo, ke la direktoro de "Espero Katolika" fakte k sincere kredas, ke la Eklezio, al kiu la hazardo faris, ke li apartenu, estas dia institucio; ke la papo estas neerarpova, kiam temas pri dogmaj aferoj k sekve, ke vi, kompatinda Eŭtrapel, dronas en senfunda abismo el eraroj.

Mi eĉ ne mirus ĉe la aŭdo, ke pastro Rambu preĝas kelkfoje por la savo de via animo — kredeble kun la espero, ke post via konvertiĝo vi fervore kunlaboros al "Espero Katolika".

"Kredu al mi: pastro Rambu neniel estas atakita de duboj pri sia dia misio sur la tero; nevundeble li staras antaŭ viaj sagoj k vi vane provus atingi, ke li faru plej malgrandan penon por ĝuste kompreni viajn "satanajn" ŝercojn . . .

"Beati qui non viderunt et firmiter crediderunt."

Laŭvorte kopiis

Eŭtrapel.

La plej bona k amuza legolibro estas

KANDID

La ĉefverko de

VOLTER

en la esperanta traduko de

L. Lanti

kun antaŭparolo de l' tradukinto k ilustroj de

R. Bartelmes

Laŭ la unuanima opinio de la recenzistaro la stilo estas modela, simpla, facillegebla.

Form. 13×19 cm. 160 pĝ.

Prezo 1.70 mk. g.

Mendu tuj ĉe Administracio de SAT, Colmstr. 1, **Leipzig O 27.**

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

AŬSTRIO. La fervojista fakgrupo de ALLE okazigis 6. 10. en Knittelfeld renkontiĝon de en- k eksterl. ferv. esp-istoj. Reprezentataj estis: Graz, Bregenz, Leoben, Innsbruck, St. Pölten, Wels, Wolfsberg k Wien. El Leipzig ĉeestis K-do Rödel (5068). Sume 60 Gek-doj. La programo enhavis i. a. unuaktan teatraĵon: "La antaŭtagmeza dimanĉa prediko" ĉerpita el "Senn. Revuo" (n-o 3, dec. 1927), kiu tre efikis. Oni difinis por la agado jenajn taskojn de l' grupo: Nepra kontakt-laboro kun provincaj membroj. En ĉiu urbo aŭ vilaĝo, kie ekzistas ferv. esp-istoj, peranto (informanto) raportu pri ĉiumonataj kunsidoj en Vieno; — k devojn de l' peranto. Sciigi pri esp. aferoj en sia loko, koncerna al la fakgrupo; instigi la ferv. K-dojn al lernado k varbado; partopreni perantan kunsidon ĉiujare okazonta antaŭtagon de Liga Plenkunveno; teni firman kontakton kun sialoka ALLE-grupo k ferv. fakgrupo. — Je la preparo de venontjara ferv. renkontiĝo (en Linz) ankaŭ eksterlandaj K-doj laŭeble aktive partoprenu! — Kursoj por komencantoj k progresintoj okazas en Vieno (Orientstacio). (9437.) — **ESTONIO. Pärnu.** Komenciĝis kurso, aranĝita de esp. klubo ĉe Laborista Unuiĝo laŭ Ĉe-metodo. Partoprenas 130 p., plejparte socialdemokrataj gejunuloj. — **SOVETIO. Barnaul.** Tutan laboron gvidas distrikta SEU-kom., kiu precipe konsistas el SAT-anoj. Ejo de l' komitato troviĝas en urba sindikata domo; ĉiutage post 18-a h. nia kom. rajtas disponi pri du ĉambroj, kie pendas esp. afiŝoj, devizoj k lerntabeloj. Tiel vizitantaj sindikatanoj konatiĝas kun nia afero. Ankaŭ telefono, skribmaŝino ktp. estas senpage je nia dispono. Nunjare la movado proksime kunligiĝis kun la junkomunista. Kiel instruktoro de distr. junkom. komitato laboras K-do 13 503. En ambaŭ urbaj junkom. komitatoj estas 2 esp-istoj en fako por intern. edukado k koresp. En urba kom. kleriga domo estas konsultejo kun konstanta ekspozicio, kiu estas malfermata dufoje semajne. Junkom. komitato akceptas volonte nian koresp., sed ni ne sukcesis ĝis nun ligiĝi kun la de ni patronata Ĉikaga junkom. organizo. Same ne respondis la bavaria junkom. organizo, al kiu ni sendis standardon lastjare. Novaj kursoj: Tuturbaj kursoj el 3 grupoj (komenca, perfektiga, supera) po 35 p. enskribitaj; meza vizitnombro 20 p.; kunvenoj dufoje semajne. Gvidas K-do 5448, por komencantoj K-do 13 503. Ĉe partia lernejo en supera kurso 8 p., en komenca: 30. Ĉe pedag. teknikumo 20 p. lernas, ĉe feltbot-fabriko du grupoj (20 k 30 p.); ĉe fervoj. klubo: 20 k 30 p., junkom-istoj devige. Ĉe klubo de ledfabriko: komenca — 20, perfektiga 6 p. Kursoj ĉe 1 2, 5, 13, 20, 22-a lernejoj, en ĉiuj du grupoj, po 20, 30 p. Gvidas K-do 5448. Ĉe baldaŭa varbado al SEU k SAT ni atenton apartan donos al abonado de gazetoj. (13 503.) — **Ivanovo-Voznesensk.** Loka grupo de prol. verkistoj "Atako" tre interesiĝis pri originala verkado (versoj) en esp-o k

petis K-don Zamjatin, kiu tradukis versojn el esp-o, liveri materialon. Precipan intereson montras K-do Nozdrin, la plej maljuna loka poeto, kiu estis unua prezidanto de soveto en j. 1905. — **Ŝadrinsk.** Nian urbon trapasis du francaj junpioniroj. Unu el ili (Roĵo Morsje) studas esp-on k nia SAT-K-do, kiu salutis la gastojn, povis interparoli kun li (kvankam M. ankoraŭ tro malbone parolas esp.). La aŭtoritato de esp-o per tiu okazo tre kreskis ĉi tie. Zorgu francaj K-doj pri pliviglîĝo de l' interkoresp-ado kun siaj fratoj sovetiaj! (10 380.) — **SVEDIO.** Stockholm. L a b. E s p. K l u b o en Stokholmo nun havas novan ejon, St. Eriksgatan 68. Regulaj kunvenoj ĉiuvendrede je la 7.30-a. 1. nov. paroladis K-do E. Eriksson pri: "Promenoj sur la bordoj de la lago Maggiore." La kunvenoj estas ordinare bone vizitataj. 6. nov. la esp. klubo de tabaklaboristoj aranĝis publikan paroladon en la ejo Södergard. Paroladis la hinda esp. agitisto Lakshmiswar Sinha; samtempe li donis bonan bildon pri la nuna situacio en sia hejmlando. A. B. F. (klerigasocio de laboristoj) aranĝis du kursojn por komencantoj. (13 906.) — **URUGVAJO. Montevideo.** Oni anoncis kurson ĉe la socialista ejo "Centro Germinal", al kiu jam anonciĝis partoprenantoj. Gvidos K-dino Casas. Esperelde tio estos ekpaŝo al esp. agado en la loka socialista sfero. (Laŭ "Argent. Esp-isto".)

Ĉu esp-o aŭ nacilingvo estis uzataj ĉe neŭtrala kongreso?

La raportinto pri la Orientfranca federacia kongreso, K-do 7369 (vidu n-on 246), kies raporto estis publike nomata malvera en "Rejna Stelo" (vidu n-on 266) alvokas la ateston de l' ĉeestintaj SAT-anoj. Li diras, ke vere s-o Archdéacon parolis esp-e, sed same vere oni akceptis la du lingvojn: esp-an k francan kiel diskutlingvojn, k uzis fakte nur la unuan. Kian lingvon parolis la "K-do" sekretario, li ne plu memoras. Neniel li aŭdis tiun strangan argumentadon ĉe alilandaj kongresoj, ke la leĝo devigas uzi la nacian lingvon kiel oficialan ĉe kongresoj de organizoj leĝpermesataj. — Jenan ateston sendis ĉeestinta SAT-ano 4671: En la Orientfranca fed. kongreso raportoj k diskutoj okazis nur en esp-o. En la postsekvinta tutfranca (SFPE-) kongreso la prezidanto parolis esp-e (laŭdire unuafoje dum tia kongreso); la posttagmezaj kunsidoj de SFPE okazis nur franclingve. Kelkaj esp-istoj ne komprenantaj francan, pro tio enuigitaj foriris. Entute la kongreso faris al li tre malbonan impreson.

K-do 7369 raportante al ni evidente intermiksis la federacian k la tutfrancan kongresojn. La ekzemplo estas instrua k instigas nin refoje admoni ĉiujn niajn raportantojn, tre atenti pri la vortoj, kiujn ili uzas, por ne venigi al ni protestojn k "ĝustigojn". La SAT-anoj nepre distingu sin per objektivemo.

Novaliĝantoj al SAT devas pagi aliĝkotizon. Vidu n-o 267 de "S-ulo".

JARABONO
por membroj . . . 8 mk. g.
por nemembroj . . 9 mk. g.
Ankaŭ ¼-jare abonebla!

Bakistoj! Atentu!

Ĉu estas esp. amikoj, kiuj volas interrilati kun ni por interŝ. spertojn pri panbakejoj, teknike, konstruo de panfornoj, analizo de faruno k fermento, baki per vaporo. Ni estas panbakejo produktanta 2500 panojn po horo en unu el niaj fornoj. Skribu al: Frans Engels, De Keyzerlei 12, **Antverpeno,** Belg.

Profitu per Esperanto!

La Universala Propagandilo de d-ro Benson estas 24-paĝa libreto enhavanta ĉ. 250 bildetojn. Je la malsupro de ĉiu paĝo troviĝas alilingva traduko de la jena frazo — "Pere de ĉi tiu kurso da lecionoj ĉiu persono povas facile ellerni la internacian lingvon 'Esperanto' sen ia helpo aŭ gvidado de instruanto". Jen la lingvoj — Angla, Araba, Bulgara, Ĉeĥa, Dana, Esperanta, Estona, Flandra, Franca, Germana, Hispana, Hungara, Islanda, Itala, Japana, Kataluna, Kroata, Litova, Nederlanda, Persa, Pola, Portugala, Rumana, Rusa. Prezo por dek propagandiloj 0.25 usona dolaro. (Mendoj por malpli ol dek ne estas akceptataj.) **Jen kie vi profitas.** — Al la dek propagandiloj ni aldonas senpage dek kuponojn. La valoro de ĉiu kupono estas 0.50 us. dol. Vendu la kuponojn kaj prenu la monon por vi mem. La kupono sendita al ni kune kun unu us. dol. aĉetas la "Universalan Esperantistigilon", kies prezo estas 1.50 us. dol.

La "Esperantistigilo" estas la sola universala, rekta kaj bilda metodo, per kiu eĉ infano povas facile ellerni la esperantan lingvon. Ĝi konsistas el dek libroj, pli ol 300 paĝoj kaj vorto-provizo el ĉ. 1500 pretaj vortoj, klarigitaj per 2300 originalaj bildoj. La bildoj klarigas ne nur vortojn de objektoj kaj agoj, sed ankaŭ gramatikajn finiĝojn, regulojn, prepoziciojn, konjunkciojn, sufiksojn, prefiksojn ktp. La preparo de la verko kostas al ni pli ol 10 000 dolarojn. Mendoj sen antaŭa pago pozitive ne estas konsiderataj. Ĉar ni estis trompitaj de kelke da fiesperantistoj per senvaloraj naciaj monbiletoj, ni ne plu akceptas nacian monon. La plej bona kaj senriska maniero por sendi la dolaron estas per "Poŝtmandato". Tiu estas akirebla en la poŝtoficejoj de ĉiu lando. Krom la poŝtmandato, skribu almenaŭ poŝtkarton kaj donu la detalojn pri via mendo kaj adreson skribitan per presliteroj, alie vi mem prokrastigas aŭ eĉ malebligas la sendon de via mendo.

BENSON SCHOOL OF ESPERANTO, 719 HIGH STREET, NEWARK, NEW JERSEY (USA).

RECENZEJO

"L' Internationale Pacifiste" de Eugen R e l g i s, avec une lettre et un message de Romain R o l l a n d. Form. 12×18 cm. 150 pĝ. Prezo 12 fr. fr. Eldonejo: André Delpeuch, 51, rue de Babylone, P a r i s.

MEMORNOTO

Priesper. artik. k notojn enhavis:

S i g n a l e n, Stokh., 7. 11.; T h e L a b o u r W o m a n, London, nov.; V o l k s s t i m m e, Magdeburg, 18. 9., 23. 10.; T r i b ü n e, Magdeburg, 20. 9.

Pri la 10. SAT-Kongreso menciis:

S u n d a y W o r k e r, London[1], 10. 11.; V o l k s s t i m m e, Magdeburg, 12. 10.; T r i b ü n e, Magdeburg, 15. 10.

Peresper. materialon enpresis:

L' E c o l e E m a n c i p é e, Saumur, 10. 11.

NIA POŜTO

9877. — Principe jes; sed ni ne povas findecidi antaŭ ol esti legintaj la artikolon. Notu ankaŭ, ke ni ĉiam preferas originalojn. "La Ruĝa Flago" aperos. E. L.

1897. — La foto kliŝita en la kronika parto devas esti pagata de vi (5 rubl.).

11 431. — L. resp. vi trovos siavice en "La Lern.".

10 662. — Ni ne uzas "la lasta kuglo", ĉar jam presita en alia lab. esp. gazeto. La ŝercojn ni uzos siavice. R e d.

[1] Tiu ĉi Londona semajna gazeto decidis ĉiunumere aperigi esp. angulon. La unua angulo troviĝas en la n-o de 10. 11.

USONO

Ni deziras interŝanĝi afiŝojn eldonitajn de klasbatalaj, revoluciaj organizoj laboristaj, de Ruĝa Helpo, de Kontraŭreligiaj societoj k. a., krome revoluciajn revuojn, fotojn de laborista vivo el ĉiuj landoj. La ricevota materialo estos ekspozata en div. laboristaj hejmoj, organizejoj (migradante de unu al la alia) en New York City k en la provinco. Ĉiu sendonto estos rekompencata sammaniere, aŭ ni klopodos plenumi specialan deziron.

Adresu klare al:
Esperantista Rondo Laborista
350 East 81st Street
NEW YORK CITY, Usono, N. A.

ENHAVO:

	pâĝo
Ĉu la Ligo de Nacioj konsistigas ion novan?	97—98
Resumoj el la libro "Standards" (Normoj)	98
La franca kamparo	99
Tradicia festo en Anglio	99
Senpreĝeja urbo	100
El usona taglibro	100—101
Aborto kaj steriligo en Danujo	100—101
Okaze de korekto	101
Faktoj kaj komentoj	102
Diskutejo	102
Sennaciula Scienc-Kultura Paĝo	103
Esperanto-Servo	104
Tra Esperantio	105—108
Anoncoj	108

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)